



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Januaro 2017 n-ro: 13



Merhaba !

Elinizdeki onüçüncü sayımızla 2016 yılını kapatıp 2017 yılına girmiş bulunuyoruz. Hepinize nice mutlu bir yeni yıl. Bu sayımızda da birbirinden ilginç yazılarla karşınızdayız.

"Muhteşem bir dünyada ilk adımlar" adlı yazı Osmo Buller'in, yani UEA'nın bir önceki direktörünün, Esperanto dünyasına nasıl girdiğini anlatıyor.

"Koma" enteresan ve fantastik başka bir hikaye, mutlaka okumalısınız.

Dilbilgisi kısmında "fiilerin değerlik"lerini anlatan kısa makale Esperanto dilini daha iyi anlamamız için önemli bir yazı.

Bu ayın en önemli günü 15 Aralık Zamenhof Günü ve Esperanto Kitap Günü.

Saluton !

Pere de ĉi tiu dektria numero de nia revueto ni adiaŭas la jaron 2016. kaj bonvenigas la jaron 2017. Bonan novan jaron al ĉiuj. Ankaŭ en ĉi tiu numero ni aperigas tre interesajn artikolojn por vi.

"Unuaj paŝoj en mirinda mondo" estas artikolo de Osmo Buller, la eksa direktoro de UEA, pri kiel li enpaŝis al la mondo de Esperanto.


"Komato" estas alia interesa kaj fantazia rakonto kiun vi devas legi.

En la gramatiko parto la artikolo pri la "verabaj valentoj" estas grava por ke ni pli bone komprenu la lingvon Esperanto.

La 15-a de decembro estas tre grava tago, Zamenhofa Tago ka Esperanto Libro Tago.

Hepinize iyi okumalar...

Bonan legadon al ĉiuj...

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org
RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
Zamenhofa Tago kaj Esperanto Libro Tago	4
Gratul-mesaĝo de ILEI por la Rekorda Esperanto Sumoo en novembro	4
Jaro de Lernanto	5
Esperanto en 12 Tagoj	5
Informiĝu pri Esperantaj Renkontiĝoj	5
Unuaj paŝoj en mirinda mondo	6
Portreto - Osmo Buller	7
Nubo de Junano	8
Duolingo: La dua Esperanto Kurso	9
Antaŭ 225 jaroj mortis Mozarto	9
Ĉu vere Tokio-Olimpikoj okazos bonorde?	10
La Malferma Tago	11
Esperanto por la Azia Kunlaboro	12
Raportas Didier Janot el Francujo	13
Poemoj- Hajkoj de Elena Popova	14
Poemoj de Maria Nazaré Laroca	14
Kruĉvort-enigmo	15
Ŝercoj	16
Rekorda Kongreso en Tanzanio	16
Eŭropo-Rapida reŝarĝo de elektraj aŭtoj	17
La ribelo de veganoj kontraŭ la nova "fiver"	17
Forpasis la Inventito de Bigmako	17
Gramatiko-Pri la verba valento	18
La retejo de ipernity fermiĝos en januaro	19
La Junaj Detektivoj - Ĉapitro 8 (FINO)	20
ESPERANTO.NET Havos novajn aspekton kaj enhavon	21
Mallonga Historio de Filozofio (12)	22
El la libro de "Dao De Jing" (6)	23
Batalo sur vinberoj	23
Komato - novelo	24
Kuiru kun mi	25
Esperanto Kurso (13)	26
Fermo	28

Kursoj



1) Kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. La kurso komencis sub la gvidado de Murat Ŭzdizdar. Estas kvar lernantoj, unu komencanto, unu progresanto, kaj du instruistoj (de la hispana kaj franca lingvoj) kiuj sekvas la kurson

2) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto. Pro manko de interesiĝantoj momente ne estas kurso.

3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo. Utku Gürdal la gvidanto okupiĝas pri sia disertacio, kaj momente estas neniu interesiĝanto por la kurso.

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51

Sub aŭspicioj de UEA
en Konsulta Partnereco kun Unesko

Nazim Hikmet Ran



Poezia antologio

El la turka tradukis Vasil Kadifeli

Mondial

Ni atendas leterojn de geamikojn



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



La 43-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis ekde la 13-a ĝis 27-a de novembro, kaj en ĝi partoprenis

318 homoj el 25 landoj. En septembro la nombro de partoprenantoj estis 250, do subite la nombro saltis supren 68 homojn pli multe ol en septembro.

Dum tiu ĉi Sumoo la partoprenantoj legis entute preskaŭ 20,000 paĝojn.

La Sumoo-konkursoj en la jaro 2017 okazos kiel jene:

- la 44a Sumoo: 2017/01/08-22
- la 45a Sumoo: 2017/03/12-26
- la 46a Sumoo: 2017/05/07-21
- la 47a Sumoo: 2017/07/02-09
- la 48a Sumoo: 2017/09/10-24
- la 49a Sumoo: 2017/11/12-26

En la jubilea 50-a Sumoo en januaro 2018 ni volas akcepti 500 partoprenantojn. Ni atendas vian partoprenon.

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?ref=bookmarks>



UEA



Konkurso por paĝaro pri Zamenhof

N-ro 654 (2016-11-29)

UEA lanĉas

konkurson por kreado de paĝaro pri Zamenhof okaze de la Zamenhof-Jaro, kiu okazos en 2017.

Se vi fakas pri retejo-kreado, prezentu vian proponon por krei retejon pri Zamenhof.

Legu pli ĉe:

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Konkurso-por-pagxaro-pri-Zamenhof>

Novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA

N-ro 653 (2016-11-28)

La Estraro de UEA nomumis, per unuanima decido, la novan Prezidanton kaj la novan Sekretarion de la Belartaj Konkursoj de UEA: Miguel Fernández Martín kaj Miguel Gutiérrez Adúriz.

Legu pli ĉe:

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Novaj-gvidantoj-por-la-Belartaj-Konkursoj-de-UEA>

Esperanto.net havas novajn aspekton kaj strukturon

N-ro 652 (2016-11-26)

Post intensa laboro de Judith Meyer kaj Adam Scott, esperanto.net ekhavis novajn aspekton kaj formaton. Ekzistas ankaŭ enhavo jam en du lingvoj, en Esperanto kaj la angla. Kompreneble, viaj komentoj, demandoj, konsiloj estas tre bonvenaj kaj en www.forumo.esperanto.net, kaj al la adreso esperantonet@co.uea.org.

Legu pli ĉe:

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Esperanto-net-havas-novajn-aspekton-kaj-strukturon>

TEJO



Komenciĝis TEJO-kampanjo pri la IJK en Afriko!

Por ke junaj aktivuloj en Afriko povu konstrui pli fortan kaj grandan Esperanto-movadon, ili bezonas renkontiĝi, interŝanĝi spertojn kaj vere senti Esperantujon. Tian eblecon ili bedaŭrinde ne havas pro vizaj problemoj kaj financaj limigoj. Pro tio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) decidis veni kun sia ĉefa evento al Afriko kaj organizi interkapabligan projekton. Restas do solvebla parto - kolekti financajn rimedojn por venigi aktivulojn de afrikaj landoj al la evento. Kaj pro tio kreiĝis ĉi tiu kampanjo!

Detaloj ĉe: tejo.org/afrika-ijk

Pasporta Servo - hastu por aperi en la papera libro!

Ĉu vi ankoraŭ ne estas gastiganto de Pasporta servo? Tiukaze vizitu www.pasportaservo.org kaj registriĝu rapide! Se vi jam estas gastiganto, bv. kontroli viajn datumojn tie rapide, ĝis 30.11.2016 – post tiu dato oni ekpretigos la paperan version de la gastigantoj. Pasporta Servo estas adresaro de homoj el la tuta mondo, kiu senpage akceptas gastojn en siaj hejmoj. Por tio, la gasto(j) kaj la gastiganto(j) devas nur scipovi Esperanton. La lasta printita adreslibro de 2011 enhavis 1089 gastigantojn el 90 landoj. Registriĝu do ankaŭ vi, por ke la nova libro enhavu eĉ pli da uzantoj!

Zamenhofa Tago kaj Esperanto Libro Tago



La Zamenhofa tago (15-a de decembro) estas la naskiĝtago de L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en la Esperanto-kulturo. En tiu tago (aŭ en alia konvena semajntago ĉirkaŭ ĝi) esperantistoj tra la mondo okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon. La idearo de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhofa tago al Kristnasko instigas la kunvenintojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Foje okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri L. L. Zamenhof. La Esperanta Civito registras la Zamenhofan tagon en sia konstitucio kiel la Tagon de la Esperanto-kulturo.



tago aldoni libro-recenzon aŭ poem-deklamadon en la

Kelkaj Esperanto-parolantoj, proponis celebradon de la 15-a de decembro anstataŭe kiel de Tago de Esperanto-literaturo (aŭ Tago de Esperanto-libro, Esperanto-Librotago). Tial ili kuraĝigas Esperanto-organizaĵojn kiuj okazigas renkontiĝojn dum tiu

programon, aŭ anonci publikigon de nova libro. Aŭ, ĉe la nivelo de unuopulo, oni povas aĉeti libron aŭ komenci novan libron aŭ per simila taŭga maniero celebri la Esperanto-literaturon en tiu tago.

La tradicio devenas jam de la 1920-aj jaroj, kiam laŭ propono de diversaj intelektuloj kaj aktivuloj (interalie Julio Baghy kaj Nikolao Nekrasov), la 15-a de decembro estis elektita kiel Esperanto-festotago.



La 15-an de decembro 2009 pasis 150 jaroj ekde la naskiĝo de Zamenhof, kio estis festita per pluraj eventoj. Tiutage la urbestro de Bjalistoko inaŭguris novan Zamenhof-centron kaj en Novjorko okazis simpozio omaĝe al Zamenhof kun prelegoj de Arika Okrent, Humphrey Tonkin kaj aliaj profesoroj. La serĉilo Google ornamis tiutage sian emblemon per la Esperanto-flago honore al la okazo (Google Doodle), kio igis proksimume 2 milionojn da personoj klaki ĝin kaj legi vikipedian artikolon pri Zamenhof aŭ esperanto.

Fonto:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Zamenhofa_Tago

Gratul-mesaĝo de ILEI por la Rekorda Esperanto Sumoo en novembro

REKORDA SUMOO

ILEI GRATULAS

Altestimata HORI san,



Aperis statistiko pri la novembra SUMOO, kun mirinde alta partoprenantonombro.

ILEI gratulas vin.

Vi elektis tre interesan strategion por atingi, ke homoj legu libron. Kopiante la strukturon de la sumoo-ĉampionado en Japanio (sesfoje jare ili konkuras dum du semajnoj), vi imagis la saman kalendaron kaj sugestas al esperantistoj lukti kontraŭ si mem legante libron laŭ la mem decidita ritmo. Neniu devas lukti kontraŭ dika peza sumoisto, neniu devas ŝviti, neniu

riskas vundiĝi, nur legi la libron, kiun la leganto mem elektis. Ruza maniero !

Plie vi prizorgas precizan kolekton de la rezultoj kaj analizon de tiuj ciferoj.

Kaj fine vi trovis helpantojn por rilati kun la plurcentoj da legantoj kaj kuraĝigi ilin dum la legado.

ILEI aŭspicias la Esperanto-Sumoon kaj feliĉas pri ĝia ekzisto. Evidente la celo de Sumoo kongruas kun la celoj de ILEI.

La Esperanto SUMOO estas via eltrovitaĵo, via «bebo». Admirinda afero en daŭra kresko. Gratulon denove ! Vi rajtas fieri pri via ideo.

Mireille Grosjean
Prez de ILEI

Ni ĉiuj estas LERNANTOJ



Kiu povas aserti: "Mi scias ĉion!", "Mi ne plu devas ion lerni"?

Neniu! Ni ĉiuj estas survoje al akiro de

novaj pliaj scioj. Sendepende de nia aĝo. Lernado okazas tra la tuta vivo.

Kiel la lernado okazas, kio okazas en la cerbo, kial infanoj lernas pli rapide ol plenkreskuloj, jen la demandoj tiklaj. La lernado fakte estas kvazaŭ miraklo. Neklarigebla fenomeno.

julio 2017) kaj provo esplori tiun fenomenon, efike helpi al Esperanto-lernantoj, lertigi geinstruistojn al trafa agado en kontakto kun lernantoj. Pro tio ILEI kaj la redaktoro de via revuo Juna Amiko ankoraŭ pli atentis pri la enhavo de la revuo, ĉar ĝia celo estas ebligi al vi agrablan lernadon de nia lingvo kaj de multaj aliaj aferoj.

Ofte oni lernas el libroj. Legante la rakonton pri la vivo de Heidi vi malkovros kuraĝan knabinon. Kami Laifo, kiu rakontas pri la nordo de Benino, kiel li instruas Esperanton, lernas en grandega sudbenina urbo informatikon, do li cef lernas per komputilo. Sed oni lernas ĉie kaj ĉiam, lernado povas okazi surstrate aŭ en arbaro, observante plantojn. Ni havu niajn okulojn kaj niajn orelojn malfermitaj!! Ni nutru nian cerbon!! Ni digestu niajn novajn sciojn per nia inteligenteco kaj saĝeco!!

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

UEA ka ILEI lanĉis la jaron de la Lernanto (julio 2016-

Esperanto en 12 Tagoj

Jam aldoniĝis la dekkvara lingvo en la retejo por la plej rapida reta lernado de Esperanto:
learn.esperanto.com

Temas pri la slovena. Ankoraŭ estas rapide prilaborataj pliaj 5. Sekve estas baldaŭ atendataj dudek lingvoj, evoluo ekde mezo de ĉi tiu jaro kiam la retejo startis.

Temas pri 12-leciona baza kurso laŭ la Zagreba metodo kiu instruas 500 plej oftajn morfemojn kaj do donas sufiĉan bazon por paroli la lingvon per minimuma vortrezoro, sed ĝuste pro tio la plej alloga maniero por komencanto, pro rapideco de lernoprogreso.

(Jen ankaŭ la turka versio)

Diskonigu pri tio, aparte tiuj kies lingvoj jam estas plene uzablaj. - Zlatko Tišljar

Informiĝu pri Esperantaj Renkontiĝoj



Esperanto-centro: EVENTOJ

Eventoj estis fama, 2-semajna Esperanto-gazeto, aperinta inter 1992 kaj 2002. La gazeto en papera formo ne plu aperas, sed la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto daŭre funkciigas diversajn servojn. – La eldonejo LINGVO-Studio / Eventoj daŭre staras je via dispono.

<http://www.eventoj.hu/>



Kiam mi estis juna knabo, mi ofte vidis informojn pri Esperanto. Ĉar mi interesiĝis pri lingvoj kaj pri novaj aferoj ĝenerale, mia sinteno al la ideo pri facila internacia lingvo certe estis pozitiva ekde la unua fojo, kiam mi legis pri Esperanto. Mi eklernis ĝin, kiam mi estis 15-jara. La decidan puŝon donis unu el miaj hobiaj, aŭskultado de eksterlandaj radiostacioj. Ĉar mi scipovis nur la finnan lingvon, mi povis sekvi nur la programojn de tiuj stacioj, kiuj dissendis en la finna. (nu el ili estis la Pola Radio. Okazis, ke ĝia finna elsendo komenciĝis tuj post la Esperanta elsendo. Por ne perdi la komencon de la finna elsendo mi serĉis la ondolongon de Varsovio en mia radiorecivilo tiel frue, ke mi ofte aŭdis la vortojn: *Finiĝas nia elsendo en Esperanto*. Tiel mi malkovris, ke Esperanto estas vivanta lingvo, ĉar ne estus radioprogramoj en ĝi, se ili ne havus aŭskultantojn. En gazeto de finnaj DX-aŭskultantoj ¹ mi legis, ke ankaŭ aliaj stacioj elsendas en Esperanto. Mi jam sciis, ke Esperanton oni povas lerni rapide. Do, mi tuj eklernu ĝin kaj baldaŭ estos pli da radio programoj, kiujn mi povos aŭskulti kaj kompreni!

Mi iris al la librovendejo de mia vilaĝo kaj diris al ĝia posedantino, ke mi volas lerni Esperanton kaj bezonas lernilon. Ŝi esploris en katalogoj kaj trovis la titolon *Esperanto-kurso*, malgranda libretode Vilho Setala, kies lecionoj estas popolaj fabeloj. Mi petis ŝin mendi du ekzemplerojn, ĉar mia plej bona amiko el la sama lerneja klaso volis studi kun mi. Baldaŭ la libretoj alvenis kaj la 6-an de januaro 1966 ni povis eklerni. Bedaŭrinde la fervoro de mia muzikema amiko daŭris nur du-tri monatojn, ĝis li ŝanĝis Esperanton al ludado en rokbanda.

Du jarojn poste mi membriĝis en UEA. Mi havis plurajn hobiajn kaj membris en organizaĵo de ĉiu el ili. Finnoj estas organiziĝemaj, do ankaŭ mi. En la kazo de miaj aliaj hobiaj mi estis membro de loka sekcio, sed kiel esperantisto mi volis rekte aparteni al la monda organizaĵo. Kiam mi skribis alla ĉefdelegito de UEA por demandi pri la membrokotizo, mi ne kuraĝis skribi Esperante, ĉar mi timis, ke estus honto fari erarojn en letero al tiel grava homo. Li respondis en Esperanto kaj diris, ke mi ĉiam skribu Esperante, ĉar nur tiel mi ellernos la lingvon. En la tago, kiam mi ricevis mian unuan jarlibron, tiun de la jaro 1968, mi estis plena de fiero. Mi tra legis ĝin ekde la unua ĝis la lasta paĝo, ankaŭ la adresojn de la delegitoj, kaj mi sentis esti

membro de nova, mirinda mondo. Jarlibro 1969 jam estis pli normala afero kaj en ĝi mi legis nur la informojn, kiujn mi bezonis.

Unu el la utilaj informoj de la jarlibro temis pri Koresponda Servo mondskala de UEA. Pere de ĝi mi ricevis adresojn de junaj esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Francio, Japanio kaj Sud-Koreio. Mi vigle korespondis kun ili. Unu el ili nun estas elstara movadano, nome Sibajama Zyuniti, kiu estas prezidanto de japana Esperanto-Instituto.

En la jaro 1969 la 54-a Universala Kongreso okazis en Helsinko, la ĉefurbo de mia lando. Jam en la antaŭa jaro mi aliĝis al ĝi kaj ekŝparis por partopreni ĝin. Estis granda aventuro por mi, ĉar eĉ en Helsinko mi neniam antaŭe estis. Mi ankaŭ ne havis sperton pri interparolado en Esperanto, ĉar ĝis tiam mi povis konversacii kun neniu. mia sola sperto estis la aŭskultado de radioelsendoj. Kiam mi venis al la kongresejo, mi vidis la plej eminentan finnan esperantiston, akademianon Vilho Setala antaŭ la ĉefa enirejo. En tiu momento mi decidis, ke li estu la unua, kun kiu mi parolos en Esperanto. Estis ja ĝuste li, per kies lernolibro mi lernis la lingvon. Mi longe pripensis miajn frazojn, kolektis la kuraĝon, iris al li kaj diris: *Bonan tagon! Mi ĵus venis kaj ne scias, kion mi devas fari*. Setala montris giĉeton, kie oni disdonis kongresajn dokumentojn. Poste li demandis, el kiu lando mi estas. Mi diris mian nomon kaj ke mi estas finno. Tuj li memoris, ke mi jam verkis recenzon pri la libro *Vivo de Ghandi* de E. Privat por *Esperanta Finnlando*, kies redaktoro li estis, kaj li laŭdis ĝin. Tiel promesplene komenciĝis neforgesebla semajno, dum kiu mi renkontis samideanojn el multaj landoj. Ĉar miaj oreloj jam alkutimiĝis al radioelsendoj, mi senprobleme komprenis ĉion kaj mia propra parolkapablo rapide progresis. Plej multe da tempo mi pasigis kun japanoj, ĉar ili estis por mi, kampara knabo, io unika kaj neniam spertita. Eĉ kun Ivo Lapenna mi parolis. En tiu semajno mi vere eniris Esperantujon.

Antaŭ la UK mi skribis unuafoje al la PolaRadio, kvankam mi estis ĝia aŭskultanto jam longe. Mi rakontis, ke mi fariĝis esperantisto dank' al la PolaRadio. Je mia granda surprizo mia letero estis premiita kiel la plej interesa letero de la monato. La premio estis la verko *La faraono* de la pola aŭtoro Prus en la fama traduko de Kabe. Antaŭ ol vojaĝi al mia unua UK mi tra legis ĝin. Ĝi estas atentokapta verko kaj facile legebla. Kiam mi legis ĝin, mi uzis

“metodon”, kiun mi uzis ankaŭ ĉe aliaj libroj kaj artikoloj. Nome, kiam mi renkontis nekonatajn vortojn, mi ne tuj rigardis en la vortaro, sed mi plu legis. Kiam mi fine interrompis la legadon, mi klopodis memori la novajn vortojn kaj nur tiam mi serĉis ilian signifon en vortaro. Ofte la vortoj tiel plurfoje ripetiĝis, ke mi malkovris ilian signifon dum la legado. Multajn jarojn poste, kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA, mi legis, ke en la antaŭmilita laborista Esperanto-movado de Nederlando oni diris, ke por esti vera esperantisto necesas legi *La faraonon*. Mi ĝojis konstati, ke mi

fariĝis vera esperantisto jam kiel lerneja knabo.

Osmo Buller

2004-02-23

Teksto por La Komencanto, Rusio

¹ DX-aŭskultanto: fakvorto por aŭskultanto de eksterlandaj radiostacioj, kiuj elsendas sur mallongaj aŭ mezlongaj ondoj

Portreto - Osmo Buller



Osmo Tapani BULLER (naskiĝis la 12-an de novembro 1950 en Taivalkoski) estas finna esperantisto, komitatano C de UEA, antaŭe multjara Ĝenerala Direktoro de UEA.

Buller magistriĝis pri ekonomiko kaj filozofio en Oulu. Li eklernis Esperanton en 1966, membriĝis en Universala Esperanto-Asocio en 1968 kaj estis helpanto en la 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko en 1969. En 1978 li kunfondis Esperanto-Societon de Oulu, kies prezidanto li estis en la jaroj 1983–1985. Li estis estrarano de Esperanto-Asocio de Finnlando 1979–1981 kaj kunredaktoro de ĝia organo Esperanta Finnlando 1979–1985.

En julio 1985 li eklaboris la unuan fojon en la Centra Oficejo de UEA, komence kiel kongresa oficisto kaj ekde 1986 ĝis oktobro 1987 kiel Direktoro de la CO. Poste li estis elektita kiel Ĝenerala Sekretario de UEA por la oficperiodo 1989–1992, sed fine de 1990 li rezignis por denove eklabori en la Centra Oficejo kiel direktoro ekde 1991.

En 1996 li fariĝis Ĝenerala Direktoro de UEA kaj oficis ĝis 2001, kiam li demisiis. Kelkajn monatojn poste oni elektis lin la Esperantisto de la Jaro, aprezante lian laboron en la CO. En aprilo 2004 li revenis al la Centra Oficejo kaj ekde tiam ĝis sia emeritiĝo, en majo 2016, estis Ĝenerala Direktoro. En la 101-a Universala Kongreso Buller elektiĝis komitatano C de UEA por la oficperiodo 2016–2019.

Buller en novembro 1994 iniciatis la unuan Malferman Tagon de la Centra Oficejo, komence kiel unufojan eventon. La ideo evidentiĝis tiom sukcesa, ke la Malferma Tago estas organizata ĝis nun dufoje jare.

Ankaŭ la Gazetaraj Komunikoj, kiuj aperas ekde majo 1998, estas lia ideo kaj unu el la kialoj por kiuj oni elektis lin la Esperantisto de la Jaro 2001. Post lia reveno en 2004 estis realigita funda rekonstruado de la oficeja domo de UEA, kompletigita en 2008.

En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj Buller aktive recenzis Esperanto-librojn, precipe por Esperanta Finnlando kaj Hungara Vivo. En 1989 aperis lia traduko de La finna vojo de Urho Kekkonen kaj surbaze de tiu traduko ankaŭ hungara traduko fare de István Ertl samjare. Buller estis sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA de 1989 ĝis 2001.

En la periodo kiam Buller estis estrarano de UEA, li laboris en la urbodomo de sia finna hejmurbo, Taivalkoski. Tiam laŭ lia propono la Pola Televido kaj ĝia ĵurnalisto, Roman Dobrzyński, produktis en Taivalkoski la filmon Reveno al Finnlando (1989), en kiu Esperanto rolis kiel helplingvo. Ankaŭ tiam li iniciatis la fondon de la kultura Päättalo-Instituto, honore al la fama finna verkisto, Kalle Päättalo, kiu naskiĝis kaj kreskis en tiu urbo. Buller estis direktoro de tiu instituto en la jaroj 2002–2004, kiam li havis paŭzon en la laboro en la CO. La Instituto organizas verkistajn seminariojn kaj konkursojn, ankaŭ por esperantistoj.

Buller ricevis honor-insignon de Mondpaca Esperantista Movado en 1988, la vjetnaman medalon "Pro Paco kaj Amikeco inter la Popoloj" en 2010[5] kaj la "Amikec-premion por Esperanto" de Ĉina Esperanto-Ligo en 2014.

Fonto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Osmo_Buller



Mi ŝatas vojaĝi al nacimalplimultaj loĝlokoj en landlima regiono de Ĉinio. La brilajn vestojn kaj ornamaĵojn de la nacimalplimultoj oni facile asocias kun pompaj plumoj de birdoj. En tio estas ia

mistero. Mi ne scias, ĉu ili estas misteraj pro la beleco aŭ belaj pro la mistero. Jen kial mi ŝatas Junano-provincon, kie de antikve vivas multaj nacimalplimultoj -- taj-oj, ji-oj, ŭa-oj, baj-oj, lahu-oj, buji-oj, mjaŭ-oj, tuŝja-oj..., kiuj kiel steloj formas galaksion sur la tero. Ni devas posedi tre abundajn sciojn por distingi ilian vivfonon kaj kulturen tradicion. La tero estas plej proksima al ni, sed ne malpli mistera ol la ĉielo, ĉar la homaro sur la tero signifas pli komplikajn konstelaciojn.



Junano vekis en mi amon al ŝia folkloro. Kiam mi eniris profunde en montaron loĝatan de diversaj nacimalplimultoj, mi kvazaŭ malkovris antikvan spegulon, en kiu speguliĝas antikvaj konstruoj, dialektoj kaj scenoj de ĉiutaga vivo. Hazarde renkontante homojn sur vojeto, mi povis bone distingi ilin laŭ iliaj vestoj kaj ornamaĵoj kiel arbojn laŭ arbofolioj, kvankam mi ne konas iliajn lingvojn. Mi tre interesiĝas pri iliaj vestoj. Kvankam iliaj vivmaniero kaj ideologio moderniĝas, tamen iliaj tradiciaj vestoj restas senŝanĝaj. Sur rivero sen navigacia marko flago estas signalo, kaj la jupo, zono, kufo, brodita saketo kaj arĝenta ornamaĵo konigas kiel ĉiamaj flagosignaloj: de kie mi venas, kien mi iras, kiu mi estas...

La nuboj de Junano signifas ne nur naturan nubon, sed ankaŭ kulturen. La kolorriĉaj vestoj de nacimalplimultoj konsistigas la nubon de Junano: vaks-tinktura nuboj, brodita nuboj, silka nuboj, kotona nuboj... La heredita ligna teksilo en ĉiu hejmo estas la plej antikva ilo produktanta nubon. Ĉu la nuboj en la ĉielo povas esti egale disdonita al ĉiu homo? Tamen ĉiu homo sur la tero ja deziras sian propran nubon, kiu

sekvas kiel ties ombro. Vesto estas ombro de homo, ankaŭ ombro de nacio. Nun mi komprenas, kial Junano-anoj tiel adoras pavon -- ĉar ŝi havas luksan veston, kiun la homaro ne povas imiti. Dum la tuta vivo ŝi prezentas modan veston al la homoj.



La sudaj trajtoj kaj akva spirito estas la alia kialo, ke mi ŝatas la nacimalplimultojn de Junano. Ekzemple la Akvoverŝa Festo de taj-oj montras la intimecon kaj respekton al akvo. Taj-oj verŝas akvon unu sur alian en signo de beno. Kiel nuboj kaj pluvo, la kanto kaj danco de nacimalplimultoj humidigas mian koron sekiĝintan pro la urba civilizacio.

Hodiaŭ ni urbanoj nur scias modernan dancon, sed la nacimalplimultoj de Junano dancas ankoraŭ laŭ ritmo kreita de iliaj antaŭuloj, rememorigante bivakfajron, tamburadon, svingiĝajn kapornamonojn kaj piedbraceletojn, akompanate de lignaj, bambuaj, eĉ ŝtonaj muzikiloj. Kompare kun ili, ni fariĝas kvazaŭ ujoj perdintaj la memoron, almenaŭ la denaskajn kapablojn de kantado kaj dancado. Ĉu ni forĵetas la tradicion aŭ la tradicio forĵetas nin?

Vizaĝe al la kantantaj kaj dancantaj nacimalplimultanoj mi hontas kaj sentas min kvazaŭ almozulo antaŭ riĉulo. Mi devas konfesi, ke ili konservas pli da homa naturo kaj primitiva beleco ol ni. Mi ekmemoras kunsidon de poetoj okazintan kelkdek jarojn antaŭe. Tiam poeto Xu Chi deklamis sian poemon "Sani-oj", kiu konsistas el ok versoj kun instiga fino. Kiam li diris, ke estas pli ol 20 000 sani-aj muzikistoj, dancistoj kaj poetoj en Junano, li laŭte deklamis kun ekscitiĝo:



*Vi ne opiniu,
ke troviĝas jam cent mil sani-oj,
sed nur dudek miloj da sani-oj.*

La aŭskultantoj longe aplaŭdis la lastan strofon. Mi pensas, ke la aplaŭdo estas ne nur aprobo al la artisma strukturo de la poemo, sed ankaŭ respekto al la sani-oj, kiuj ĉiuj havas kapablon, kiuj ĉiuj havas diversajn kapablojn. La sani-oj estas unu el la multaj nacimalplimulto en Junano, lertaj en kantado kaj dancado. Se vi venos al Junano, vin infektos: en tiu antikva paradizo kanto kaj danco per sia kruda beleco. Ĉar ili estas la animo de la sani-oj, ili neniam perdiĝos...

Fonto: <http://esperanto.china.org.cn/world/shi-window/literaturo/02.htm>

¹ Junano (ĉine: 云南, Pinjine: Yúnnán) estas provinco, kiu situas ĉe la sudokcidenta landlimo de Ĉinio. La norda tropiko trapasas ĝian sudon. Kun totala areo de 394 mil kvadrataj kilometroj, ĝi konsistigas 4.1% de la areo de Ĉinio.



Duolingo: La dua Esperanto-kurso



En oktobro la populara lingvoinstrua retejo Duolingo publikigis sian duan kurson de Esperanto. Ĝi instruas la internacian lingvon al hispanlingvanoj.

jaroj.

Por montri, kion tio signifas por la Esperanto-movado, mi rakontu al vi ion, kio okazis al mi kelkajn tagojn post la lanĉo de la kurso.

La konstruado de la kurso komenciĝis en septembro 2015. Ĝi certe ne kreskos tiom rapide, kiom la angla kurso kreskis, sed estas io pli grava ol la nombro de lernantoj, nome, la fakto, ke nun 400 milionoj da pliaj homoj povas lerni Esperanton per facila kaj amuza metodo. Duolingo jam montris sian gravecon por Esperanto per la anglalingva kurso, kiu en novembro 2016 atingis 600 mil lernantojn. Se la hispanlingva kurso atingus trionon de la sukceso de la alia kurso, ni povus alproksimiĝi al unu miliono da eklernintoj je la fino de 2017.

Mi loĝas en malgranda urbo en Argentino, kie mi neniam trovis esperantiston. Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis amikino mian kaj ŝian dekdu-jaran fratino. Mi kompreneble iam parolis al tiu amikino pri Esperanto kaj pri mia laboro ĉe Duolingo por la kurso, kaj, ĉar ni malofte renkontiĝas, mi memorigis ŝin pri tio, kaj ŝia fratino subite diris hispane: "Ĉu Esperanto? Mi scias, kie oni povas lerni ĝin, en Duolingo". Ŝi tute ne sciis, ke mi parolas ĝin kaj kunlaboras en Duolingo, sed ŝi konis Esperanton pro Duolingo! Tio estas la dua grava rezulto de la kursoj en Duolingo: reklamado.


Estos interese vidi, kiel la hispanlingvaj lernantoj interkonatiĝos kun la anglalingvaj. Dum longa tempo Esperanto ne havis tiom da novaj parolantoj. Nia lingvo nun iĝas pli internacia kaj granda. Espereble, baldaŭ Duolingo decidus aldoni novan Esperantan kurson. Ne gravas, ĉu ĝi estos por ruslingvanoj, portugallingvanoj aŭ ĉinlingvanoj. Gravas la kreskado de nia kara lingvo tra la tuta mondo dum malmultaj

Laŭ mia esperanteco, mia eco esti esperema, ĉiuj memoros tiun ĉi jardekon kiel la plej gravan por la historio de nia lingvo, danke al Duolingo kaj al la laboro de dekoj da homoj pri la kurso.

Lucas Cerante

Fonto: La Balta Ondo (23 Novembro 2016)
<http://sezonoj.ru/2016/11/duolingo-2>

Antaŭ 225 jaroj mortis Mozarto



En la 5an tago decembro, antaŭ 225 jaroj mortis. Mozarto, Wolfgang Amadeus MOZART, Esperantigite: Volfgango Amadeo MOZARTO naskiĝis la 27-an de januaro 1756 en Salcburgo, mortis la 5-an de decembro 1791 en Vieno) estis unu el la plej gravaj muzikistoj de la muzika historio, mirinfano.

Fonto: <https://lahodiauajurnalo.wordpress.com/2016/12/05/la-hodiauajurnalo-2016-12-05/>

Japanio sukcesis inviti Olimpikojn en 2020 en Tokio. Jam mi raportis pri problemoj pri la Olimpikoj en la lasta oktobro, sed denove aperis aliaj problemoj.




Antaŭ tio, mi raportos bonan novaĵon. En la lasta oktobro Olimpikaj kaj Parolimpikaj emblemoj estis elektitaj, sed

poste okazis suspekto pri ili, kaj oni decidis reelekti la novajn. Jen estas tiuj, desegnitaj de s-ro Tokoro Asao, el japana tradicia desegnaĵo iĉimacu.

Nun mi komencos raporti pri problemoj.

1. Kie oni bruligos olimpikan fajron?



En la lasta aŭtuno elŝprucis granda malkontento pri la Olimpia stadiono, ĉar la planita stadiono estos multege

kosta. Nun multaj japanoj vivas malriĉe kaj Japanio mem estas malriĉa, havante multege da ŝuldo. Ili postulis, ke la registaro ne elspezu tiel grandan monon al Olimpikoj, sed uzu por plibonigi la vivon de la popolanoj. La voĉoj fariĝis tiel grandaj, ke la ĉefministro Abe timis, ke tiu kritiko turnos sin al li kaj deklaris redukti la elspezon de 250 miliardoj da enoj al 155 miliardoj da enoj, elektante novan desegnaĵon de la stadiono. Multaj homoj opiniis, ke tiu sumo estas ankoraŭ multekosta, kompare kun la sumoj uzataj en la lastaj Olimpikoj, sed la kolerego malfortiĝis. Kaj la nova desegnaĵo pri la stadiono estis decidita. (foto) Tamen estas antaŭvideble, ke oni bezonos pli da mono por la finkonstruado.

Lastatempe alia problemo malkaŝiĝis. Oni forgesis desegni la lokon por olimpika fajro. Tiu fajrejo devas esti videbla por ĉiuj spektantoj kaj oni bezonas permeson de IOC. La nova stadiono estos konstruita multe el ligno, do meti la fajrejon sur la supra parto de la stadiono povos esti leĝe malfacile. Kie oni bruligos la olimpikan fajron?

2. Ĉu Japana Olimpika Komitato subaĉetis la Olimpikon?

Franca polico trovis, ke la Komitato por inviti Olimpikojn al Tokio pagis 95 milionojn da enoj en julio 2013, du monatojn antaŭ la ĝenerala kunsido de IOC, kaj 230 milionojn da enoj en oktobro post tiu kunsido, al konsultato-kompanio Black Tidings en Singapuro. La komitatestro klarigis, ke tiuj pagoj estas senproblemaj kaj necesaj por inviti Olimpikojn al Tokio. Sed la konsultato Tam kaj la filo de Lamine Diack, senegalano kaj la 5a prezidanto de la Internacia Atletika Ligo, estas konatoj, kaj la filo aĉetis multegekosten horloĝon. Oni suspektas, ke tiu mono iris al s-ro Diak, por ke li subaĉetu voĉojn de komitatoj de IOC por Tokio. Laŭ la japanaj ĵurnaloj, la oficejo de Black Tiding troviĝas en malgranda apartamento kaj ne troviĝis eĉ deĵoranto. Ankoraŭ la fakto ne estas klara, sed la pago estas tre suspektinda. Se klariĝos, ke la sumo estis uzata por subaĉeti la Olimpikojn, tio donos grandan baton al la komitato kaj la registaro.

3. La guberniestro de Tokio estas severe kritikata

Tiun Olimpikon Tokio invitis, do la plej grava respondeculo estas la guberniestro de Tokio Masuzoe, sed nun li staras sojle de ekŝigo.

Antaŭe li estis parlamentano. Parlamentanoj ricevas monon por siaj politikaj agadoj el la ŝtata buĝeto, nome el nia imposto. Kompreneble ili ne rajtas uzi la monon por sia persona celo, sed estis malkaŝite, ke Masuzoe uzis tiun monon por sia persona afero, ekzemple, kiam li tranoktis en hotelo kun siaj familianoj, kiam li aĉetis mangaojn, pentraĵojn, ĉemizojn ktp. li elspezis monon el tiu buĝeto. Post kiam li fariĝis la guberniestro, ĉiun semajnfino li veturis al sia vilao 80 kilometrojn for por sia persona bezono, ne per taksio, sed per aŭtomobilo por lia oficiala uzo.

Tiamaniere li uzis nian imposton por sia ĝuo, por sia vivo, por sia hobbio, kaj eĉ por sia profito kaj sia invensto, do 95% de la tokio-anoj koleras kaj postulas lian ekŝigon, sed ĝis nun li nur ripetas, ke li plenumos sian taskon kiel la guberniestro, pardonpetante pro siaj malbonaj agoj, duonigante sian salajron kaj forvondante sian vilaon. La plej grava respondeculo de la Olimpikoj estas en tiu mizera stato. Entuziasmo al Tokio-Olimpikoj pli kaj pli velkas, kaj en ĵurnaloj aperas

opinioj pri malakcepto de la Olimpikoj.

4. La nuklea akcidento ankoraŭ ne estas regebla



Kiam la ĉefministro Abe invitis la Olimpikojn, li mensoge deklaris: “La nuklea akcidento estas

sub kontrolo”, sed tio estas mensogo. Ĉiun tagon multe da akvo enfluis sub la difektitajn reaktorojn kaj fariĝas forte radioaktiva. Por bari la enflon de subtera akvo, oni konstruas glaciigitan termuron ĉirkaŭ tiuj reaktoroj, sed ankoraŭ ne sukcesis. Tial pli kaj pli multiĝas grandaj akvujoj en la tereno de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima.

Tamen, Abe deklaras la 14an de junio, ke 46000 el ĉirkaŭ 70000 rifuĝintoj en Fukuŝima povos reveni hejmen ekde aprilo 2017. Ĉar unu el la sloganoj de la Tokio-Olimpikoj estas “montri al la mondo, ke Japanio

reviviĝis”, Abe volas ŝajnigi, ke la nuklea akcidento finiĝis. Tamen por la loĝantoj tia deklaro ne estas akceptebla. La registaro diras, ke ĝi purigis la teron sufiĉe bone, sed ne perfekte por ke infanoj loĝu tie. Krome ĝi ne havas intencon purigi la arbarojn. Mankas infrastrukturo, makas vendejoj, hospitaloj, najbaroj. Do multaj ne revenos.

Por prepari Olimpikojn, oni bezonas multajn laboristojn. Certe multaj direktos sin al Tokio, ĉar salajro estas pli alta tie, sekve mankos laboristoj en la cunome damaĝitaj regionoj en Toohoku. Pro konstruado de diversaj instalaĵoj en Tokio, mankos materialoj por damaĝitaj regionoj. Povos esti, ke Olimpikoj plimizerigos la vivon en tiuj regionoj kaj plimalfruigos la restariĝon. Komence multaj entuziasmiĝis pro la Olimpikoj, sed multaj jam rimarkis, ke prosperi per la Olimpikoj estas iluzio desegnita de Abe.

HORI JASUO

La 10an de junio 2016

La Malferma Tago



Plenŝtopitan salonon atendis Chuck Smith kiam li post la tagmeza paŭzo faris prezentaĵon kun la titolo ‘Evoluo de E-lernado kaj –komunumo ekde 2000 en la

interreto.’ Evidente, ankaŭ tiu temo rilatas rekte al la Jaro de la Lernanto, la ĉeftemo de la 45a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA. Disdonita folio emfazis la longtempan agadon de la prezentanto en la kampo kaj helpas komprenigi la ĉenon da eventoj, kiuj kulminis en la nunaj projektoj: Duolingo kaj Amikumu.

Jen tiu listigo: 2000 Vikipedio (en Esperanto), 2002 Edukado.net kaj Lernu.net, 2007 Komputeko, 2011 Muzaiko, 2012 Vortaro.net kaj Google Translate (malfermo al Esperanto), 2015 Evildea (filmetoj), Duolingo (angla-Esperanto), Telegramo (rapidkomunikilo), 2016 Nova Lernu, Stack Exchange (retejo por demandoj kaj respondoj en la angla aŭ Esperanto), Duolingo (hispana-Esperanto, nun en publike alirebla testo-fazo) kaj 2017 Amikumu (trovprogramo kun geografia konscio – trovu per poŝtelefono homojn en via apudeco, kiuj dividas kun vi la kapablon paroli difinitan lingvon). Informoj pri tiu plej nova projekto, subtenata de UEA, troviĝas ĉe amikumu.com aŭ amikumu.com/ks,

facebook.com/amikumuapp kaj en Twitter ĉe @amikumu. La ĵusa monkolekta kampanjo por la programo arigis en mallonga tempo sumon de 26 mil eŭroj. Planoj estas, ke la servo (nun praktike dulingva) funkcii multlingve kaj poste eĉ por ligi homojn kun samaj interesoj kaj lingvoj.



Pri la aktuala temo ‘Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo: por kunhavigi ideojn kaj spertojn de afrikaj kaj eŭropaj esperantistoj’ prezentis Pierre Vittet, volontulo de TEJO en la CO. Li rakontis pri sukcesa renkontiĝo en Benino (vidu la kovrilon kaj artikolon de la oktobra numero de la Malferma Tago de CO revuo Esperanto. La projekto havas eksteran financadon kaj tial povas enhavi kvar renkontiĝojn, du en Afriko, du en Eŭropo. Grava celo de la projekto estas prepari la vojon por la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Afriko en 2017.

Pri la ĵus renovigita (kaj renovigata) retejo <esperanto.net> prezentis Judith Meyer. Sekve de konkurso la celo estas doni al la mondo pli trafan multlingvan informojn pri lingva justeco kaj la ebloj de Esperanto. Jam la alteriga paĝo estas pli alloga – kun instigaj bildoj, slogano kaj baza teksto; ĝis nun tiu paĝo proponis nur liston de retligoj, sen klarigoj pri la celo de la diversaj paĝoj. Klare la multlingvigo de la paĝaro daŭros, sed donas al varbemuloj abundajn eblojn kontribui praktike al la projekto.

Seminario pri Informado – aktuala temo por ni

Judith Mayer prezentis denove en la dimanĉa programo, nome seminario pri informado, pretigita ĝuste por tiuj personoj, kiuj preferis resti tra la tuta semajnfino. Tiam ŝi skizis kiel transformi la aliron al la pretigo de retaj komunikoj por altigi la eblojn de 'virusa disvastigo'. Alia referanto estis la anekdotriĉa Mirejo Grosjean. (mezrakonte maldekstre en la bildo) Seminarianoj havis okazon diskuti engrupe kaj reraporti pere de gluslipetoj, grupigotaj sur tabulo.

Entute okazis inspiraj kaj laborigaj tago kaj semajnfino, pro la zorga elekto de gvidantoj kaj temoj, diversaĝa kaj engaĝita partoprenantaro kaj ebloj por

interaktivado.



Raportis: smg, kiu liveris ankaŭ la fotojn.

Fonto: Estrara Komunikado EKO 2016-35 sendita el Roterdamo pri la Malferma Tago, la 27an de novembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com por aldoni aŭ subtrahi vin de la ricevantaro de EKO

Esperanto por la azia kunlaboro

278 esperantistoj venintaj el 20 landoj partoprenis la 8an Azian Kongreson de Esperanto, kiu de la 3a ĝis 6a de novembro sukcese okazis en la pitoreska ĉina urbo Quanzhou [Ĉĵuanĝoŭ] kun la ĉeftemo "Esperanto por la azia kunlaboro en interreta epoko". Paralele kun ĉi tiu kongreso okazis la 5a ILEI-Seminario en Orienta Azio kun la temo "Lerni Esperanton per moderna metodo" kaj la 10a jarkunveno de IKEF-Ĉinio (komercista asocio).



Antaŭ la inaŭguro estrarano de UEA Lee Jungkee prezentis dek gravajn novaĵojn el UEA. La kongresan inaŭguron mesaĝe salutis la prezidanto de UEA Mark Fettes; surpodie salutis Lee Jungkee, ĝenerala

direktorino de UEA Veronika Poór, prezidantino de ILEI Mirejo Grosjean, prezidanto de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado) Wang Ruixiang, vicurbestrino Wang Jianping, vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldonejo Fang Zhenghui. La prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo Chen Haosu faris salutan paroladon.

Dum la kongreso okazis 23 programeroj paralele en ses ĉambroj, Markus Gabor prelegis pri la Eŭrazia Kultura Centro kaj pri indramang-metoda lingvoinstruado en koreaj kaj tajlandaj universitatoj; So Gilsu pri la azia Esperanto-movado kaj pri la diversaj vojoj al la 102a UK en Seulo (2017); Ilona Koutny pri eŭropaj kaj aziaj trajtoj de Esperanto, pri universitata instruado de Esperanto kaj esperantologio, pri kunlaboreblo inter Eŭropo kaj Azio; Zbigniew Galor pri Esperanto kaj esperantistoj en spegulo de sociologiaj esploroj; Ragnar Baldursson pri Esperanto kiel interkultura komprenigilo, Hori Jasuo pri internacia Esperanto-sumoo kaj aliaj temoj; Wang Tianyi pri deveno de la ĉinoj; Isikawa Tiekio pri Esperanto-ekzercaro por japanlingvaj komencantoj; Nema pri la korea landa kongreso, pri tutlanda trejn-sistemo, pri

volontuloj de UK, pri la 50a ILEI-kongreso en Busan (2017); Arko (Gong Xiaofeng) pri Esperanto-instruado en Ĉinio, Mirejo pri lernado-encerba mirakla procezo, Ju Jianchao pri plezuro en legado; Chen Ji pri lingvolernado en la interreta epoko.

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) prezentis amuzajn programojn, ekzemple, pri manskribado de ĉinaj ideogramoj "Unu zono kaj unu vojo". Ĉiuj aziaj landoj prezentis la Esperanto-movadon en siaj landoj. En la kunsido pri landa agado kaj Esperanto-movado en la reta epoko oni varme diskutis pri la movado en Azio. La prelegantoj el Filipinoj, Indonezio kaj Vjetnamio allogis ĉeestantojn per la junaj vizaĝoj kaj aktiveco. La plej juna preleganto estis la 18-jara studento Albert Stalin T. Garrido el Filipinoj. Lia prelego pri la Filipina Esperanto-movado ege interesigis la ĉeestantojn. Li diris, ke mankas nejunuloj por gvidi la movadon en Filipinoj. Markus Gabor promesis flugi al Filipinoj por semi kaj akvumi. Oni lanĉis kampanjojn por instigi multajn partoprenantojn al la 102a UK, la 50a ILEI-kongreso kaj la 1a komuna kongreso de IKEF en Koreio en 2017. En la kunveno de KAEM, d-ro So Jinsu estas elektita kiel KAEM-prezidanto, Inumuru Fumio kiel vicprezidanto kaj Chimedtseren Enkhee kiel sekretario.

La nova estraro de KAEM deklaris, ke la 9a Azia Kongreso de Esperanto okazos post tri jaroj en Vjetnamio. En lasta duontago 23 partoprenantoj partoprenis KER-ekzamenon. Abundas programoj distraj kaj instruaj en nacia kaj internacia vespero, ekskursoj antaŭ, dum kaj post la kongreso.

El Popola Ĉinio, ĈRI kaj eksteraj ĵurnaloj kaj televido faris multajn intervjuojn pri la kongreso. Antaŭ kaj post ĝi multaj ĉinaj esperantistoj fariĝis ĉiĉeronoj aŭ gastigantoj por gvidi aŭ gastigi fremdlandajn esperantistojn en Ĉinio. (En restoracio mi aŭdis, ke juna japano diris, ke li hontas pro tio, ke ĉinaj amikoj ĉiam pagis lian manĝadon.) Por sukcesigi la kongreson LKK fondis Esperanto-kurson por 40 studentoj, kiuj volontule laboris por la kongreso. Oni bone semas kaj sukcese akvumas en la kongreso. Ni semas kaj semas, akvumas kaj rikoltas! En sia ferma parolado la nova KAEM-prezidanto d-ro So Jinsu diris, ke li esperas revidi la volontulojn en la venonta kongreso! Tio fakte estas komuna espero de ĉiuj partoprenantoj de la 8a Azia Kongreso de Esperanto.

Trezoro Huang Yinbao
Foto de Semio

Aziaj Kongresoj de Esperanto

Nº	Jaro	Loko	Aligintoj	Ĉeftemo
1	1996	Ŝanhajo (Ĉinio)	486	Azio kaj la 21a jarcento
2	1999	Hanojo (Vjetnamio)	420	Kunlaboro por paco, stabileco kaj disvolvigo
3	2002	Seulo (Koreio)	552	Interkompreniĝado inter kulturoj
4	2005	Katmanduo (Nepalo)	173	
5	2008	Bengaluro (Barato)	254	Esperanto en multlingva Azio
6	2010	Ulanbatoro (Mongolio)	254	Azia harmoniigo per Esperanto
7	2013	Jerusalemo (Israelo)	160	Ekologio de paco – paca kunvivado de homo, medio kaj naturo
8	2016	Quanzhou (Ĉinio)	278	Esperanto por la azia kunlaboro en interreta epoko

Fonto: La Balta Ondo (15/11/2016)
<http://sezonoj.ru/2016/11/azio/>

Raportas Didier Janot el Francujo



Dum tri tagoj (18-19-20 novembro 2016) en Parizo okazis granda foiro pri edukado ([http://salon-](http://salon-education.com/)

education.com/). Espéranto France kaj Espéranto Paris Île-de-France havis budon por prezenti Esperanton. El la pli ol 500.000 vizitantoj de la foiro pluraj miloj da homoj preterpasis nian budon, 3700 ricevis etan reklamilon, kaj ni alparolis ĉirkaŭ milon da ili (inter 10 sekundoj kaj 10 minutoj). Inter ili troviĝis multaj mezlernejoj (11/18 jaruloj). Multaj junuloj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto, kaj estas iom malfacile por ili imagi ke en la mondo ekzistas lingvo facile lernebla kiu ne estas lingvo de iu lando aŭ teritorio. Tio konfirmas la gravecon informi junajn junulojn pri Esperanto.

22/11/2016



En la novembra numero de nia revueto ni prezentis al vi nian novan legantinon **Elena Popova** kiu estas verkistino kaj loĝas en Bulgarujo. Ni dankas ŝin por la permeso prezenti al vi kelkaj el ŝiaj hajkoj. Ĉi foje ni prezentas al vi ŝiaj hajkoj pri sezono "**Somero**" el ŝia libro "**La sezonoj de la animo**".

Hajko estas tradicia japana lirika poezio, ekzota floro en la kampo de la arta kulturo, kiu malfacile kreskas en aliaj landoj. Ĝi estas produkto de alia mondrigardo kaj defio por la artisto. Kontraste la malavara poezia esprimo en la okcidento, la japanaj poetoj kapablas nur en tri mallongaj linioj de 5-7-5 silaboj kapti la momenton kaj transdoni sentojn.

*La suno kisis
la lunon. Ĝi ekbrilis.
Nokta sonato.*

*Buntaj balonoj
super la mara vastaj'.
La somer' flugas.*

*Boatoj en la
golfo, kiel fiŝaro.
Ruĝa ĉielo.*

*Bonodor' de roz'.
Averto: Pikiloj eĉ
en la belaĵoj!*

*Kaptitaj fiŝoj
sen rajto pri defendo.
Solaj luktantoj.*

*Kant' de alaŭdoj.
Aromo de grenspiko.
Rikoltsezono.*

*Maturaj grenoj.
Pendanta danĝero de
malhelaj nuboj.*

*Steloj brilegas.
Mira grila orkestro.
Stela dirigent'.*

*Jam maturiĝis
la tritiko. Estos pan'.
Hom' kaj formikoj.*

Poemoj de Maria Nazaré Laroca

Poemoj

Kajto

Mia senfino faritas
de tegmentoj kaj
sufokitaj suspiroj.

Jes, mi teksitas
el tia infanaĝo
nudpieda ankoraŭ.

Silkpapere,
de fierec' streĉita
kaj stangetoj.

Miaj koloroj superflugas
montojn kiuj aplaŭdas
la menueton kun vento.

Mia ĝojo vojaĝas
sur la fadeno;
ĉe l' alia ekstrem' jenas
la mister' de l' knabo.
Mi apenaŭ sukcesas
atendi la birdiĝon.

Maria Nazaré Laroca
Juiz de Fora, 20/10/2013.

Fantazio



Lastan klason en NASK.
Tra la verda aero,
dancas lumaj vorteroj,
kiel feinoj pacaj.

La magia ĉapelo
sur la tablo dormetas...
Sed tute ne atendite
Bertilo diras gracie:
"Mi ŝvebas super la ter!"

Kaj flokoj el feliĉo
milde falas sur nin,
kiel sopira vual'...
Jenas mondo reala!

(Al Bertilo Wennergren)

Maria Nazaré Laroca
Juiz de Fora, 17/07/2016.



Fonto:

<http://nazarelaroca.blogspot.com.tr/2013/10/pipa-kajto.html>

Fonto:

<http://nazarelaroca.blogspot.com.tr/2016/07/fantazio.html>



Krucvort-enigmo

Horizontale

1) Montri aprobon aŭ entuziasmon per klakrapoj de la manoj. La ag' eligi el si idon.

2) Prefikso montranta la sekvantan, supreniran aŭ malsupreniran gradon de parenceco. Iompostioma laŭnatura disvolviĝo kaj aliformiĝo.

3) La dua epoko de paleogeno. Sufikso esprimanta la malplej altan gradon de grandeco aŭ intenseco, plej ofte kun specialigo de la radikvorta ideo.

Prepozicio signifanta «koncerne al, rilate al, teme de» kaj uzata post verbo, por montri la objekton, okaze de kiu fariĝas la ago.

4) Forto de la karaktero, de la mensa aparato, direktata al celo kaj persista por ĝin atingi. Elemento, kun amfotera karaktero kaj atomnumero 44.

5) Doni (ion) laŭrajte aŭ laŭmerite. (inverse) Vir' generinta idon.

6) Partikulo, signifanta: «pli ol sufiĉe; pli ol necese; pli ol ĝustamezure». Pli-malpli mola substanc', preparita el graso kaj alkalo, uzata por lavpurigi.

7) Unuo de valoro ĉe ludoj, sportoj, lernejoj ks.

8) En la relativa solfeĝo la kvara tono super la toniko. Tempomezurunu', egala al la daŭro de unu kompleta rondiro de tero ĉirkaŭ la suno. Tia, ke ĝia rando estas tranĉa aŭ ĝia pinto pika.

9) De tropikaj palmarboj, kies fruktoj (drupoj aŭ «nuksoj») havas karnan, oleoriĉan perikarpon, el kiu oni ekstraktas oleon. Ano de slava gento, loĝanta en orient-eŭropa lando.

10) (inverse) Pronomo uzata de iu, parolanta pri si. Direkt-igi la elvolviĝon de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj de infano aŭ junulo.

11) Oficiala aŭ ĵurligita oficisto, kies funkcioj estas iom diversaj laŭ la landoj, sed kiu ordinare estas leĝe rajtigita redakti, atesti, konservi kontraktojn, aktojn ks. Samsoneco, inter du aŭ pluraj vortoj, de la akcenta vokalo kaj de ĉiuj ĝin sekvantaj son-elementoj.

12) Malmola organ' de la vertebruloj, precipe konsistanta el konektivo. Pagilo aŭ difinita kvanto da tiu pagilo, uzata kiel interŝanĝilo en aĉeto kaj vendo.



Vertikale

1) Partikulo, montranta neplenan atingon aŭ nesufiĉecon. Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj.

2) Prepozicio montranta la kaŭzon de ago. Arekaco.

3) Relative malgranda reptilio el la ordo de skvamuloj, kun mallarĝa kolo, kvar evoluintaj kruoj kaj longa maldika vosto. La 24a grafemo de la E-a alfabeto.

4) Loko, tra kiu oni eniras. Ludkart', ĵetkuba fac' aŭ domenpec' kun unu sola punkto.

5) Ne donanta la atenditan kontentigon aŭ profiton. (inverse) Partikulo, signifanta «en alta grado».

6) Kovri per maldika tavolo de oro (imperativo). Devigi iun kontraŭ lia volo al io malagrable, devige akceptigi ion al iu.

7) En neprecizigita loko. Alojo el fero kaj karbono, kun proporcio de 2 ĝis 6,6% da karbono. Nomo de la 16-a litero de la latina alfabeto.

8) Eligi kriojn de ĝema plendo pro kordoloro. Part' de cirklo aŭ de alia kurbo.

9) (inverse) Barion' kun pozitiva elektra ŝargo en la atoma nukleo. Ĉefurbo de Egiptio.

10) Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto. Punkt', de kiu io evoluis kaj disvolviĝis.

11) Estanta alte, en loko ĉe la ekstremo kontraŭa al la bazo. Ne sensperceptebla forto, rigardata kiel la esenco kaj la ekspliko de la vivo de ĉiu ekzistaĵo.

12) Ago kaj rezulto de maljuste akiri ies favoron per mono, donacoj aŭ promeso.

Ŝercoj



Maljuna arabo vivas dum multaj jardekoj apud Ĉikago, Usono, kaj post longa kaj fortoraba laboro li pensiigis. Li posedis ĝardenon, sed ĝis nun pro tempomanko ĝin ne tre bone flegis. Li nun ŝatus kultivi kaj planti terpomojn. Sed li estas sola kaj jam iom kaduka.

Lia filo Ahmed vivas en Parizo, kie li studas ekonomion. Al li, la patro iun tagon skribas e-poŝton: "Kara Ahmed, mi nun vere ŝatus kultivi terpomojn en mia ĝardeno, sed antaŭe mi devus tiun prepare disfosi, ĝi ja estas vera sovaĝejo. Bedaŭrinde mi estas maljuna viro kaj por tiu laboro ne plu sufiĉe forta. Tial mi estas iomete malgaja. Morgaŭ mi tamen volas iel komenci la laboron, sed ĝi tutcerte daŭros tre, tre longe. Mi estas konvinkita, ke se vi estus kun mi, vi kun plezuro farus tiun fosadon por via maljuna patro. Mi amas vin. Via paĉjo!"

La sekvan tagon la maljunulo ricevas respondan e-poŝton de sia filo: "Kara paĉjo. Dankon por via mesaĝo. Mi konfesas, ke mi ne kredis, ke vi fakte aŭdacus entrepreni tian pezan laboron. Sed mi urĝe petas vin ne disfosi la ĝardenon, ĉar mi sen via scio enterigis certan objekton. Mi pardonpetas. Do, bonvolu lasi la ĝardenon kia ĝi estas, kaj simple ĝuu vian pensiulan vivon. Mi ankaŭ amas vin. Via filo Ahmed."

La sekvan matenon je la 4-a horo, antaŭ la domo de la arabo, aperas viroj de la usona armeo, de la maristoj, de la FBI kaj de la CIA. Ili ĉie serĉas en la ĝardeno, kaj lasas nenion je ĝia loko, tratalpas kaj kribras ĉiun milimetron, sed nenion trovas. Tiam ili senluziigitaj forlasas la arealon.

Post kelkaj tagoj venas nova e-poŝto de la filo por la maljuna arabo: "Kara patro, mi esperas, ke intertempe via ĝardeno estis plene disfosita, tiel ke vi nun povas ekplanti viajn terpomojn. Mi ne plu povis fari por vi de ĉi tie. Mi amas vin. Via filo Ahmed."



Rekorda kongreso en Tanzanio

Jam 82 personoj el 22 landoj aliĝis al la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto. Certe rekorda kongreso el la historio de afrikaj kongresoj laŭ la listo de la aliĝintaj landanoj. Multaj aktivaj Esperanto-agantoj, bonvoluloj de la tanzania movado arde laboras kunlabore kun la Afrika Komisiono de UEA por pretigi la plej sukcesan kaj agrablan kongreson.

Lige kun La Jaro de la Lernanto lanĉita de UEA kaj ILEI, okazos dumkongrese lingva kaj ekzamena sesioj sub la gvido de internacia afrika forto kun helpo de la Vicprezidanto de UEA Stephan MacGill. Jam enskribiĝis tri dek da kuraĝaj ekzamenotoj por ĉiuj tri niveloj de la movadaj ekzamenoj.

En aliaj mondpartoj oni aktiviĝas ankaŭ por helpi diskonigi la internacian lingvon ĉeeste en la kontinento per interesaj kaj turismaj programoj. Unu el tiuj ĉi programoj estas la karavano el Azio kun 11 koreaj esperantistoj al la kongreso sub la gvido de prof. So Gisu. Simlan aranĝon prizorgas s-ro Arnaldo Rebelato el Brazilo. En la AKE gastprelegos altrangaj

figuroj de Esperanto-medio i.a. Dr. Gabor Markus kaj aliaj. Aliaj programoj por igi la renkontiĝon agrable ne forgesebla estas ankoraŭ en preparado kaj pri ili la partoprenontoj mem prefere havos plaĉan surpriziĝon ĝui ilin surloke.

AKE-6 ĉefe okupiĝos pri la temo "paco kaj disvolviĝo", i.a. la disvolvo de la afrika kulturo, kune kun disvolvo de Esperanto en la kontinento. Mallonge, la organizantoj prepariĝas por kunaltigi la prestiĝon de la enkontinenta movado en la centro de la tanzania urbo Bunda, de la 24-a ĝis la 31-a de la tuj sekva decembro.

Ĉiuj, kiuj ne povus mem ĉeesti la renkontiĝon en Tanzanio por rekte interkonatiĝi kaj alparoli kun afrikaj gesamideanoj, bonvolu sendi salutmesaĝon al ĝi. Ĉiuj salutmesaĝoj estos bonvenaj kaj voĉlegataj dum la kongresa inaŭgura ceremonio. Ili plie aperos en la kongresa kajero, kiu nun estas en kompilado.

Raportis Adjévi ADJE el Lomé-TOGO

EŬROPO – RAPIDA REŜARGO DE ELEKTRAJ AŬTOJ



Kvar el la plej grandaj fabrikoj de aŭtomobiloj de la mondo interkonsentis pri investo je miloj da lokoj en Eŭropo

por rapida reŝargo de elektraj aŭtoj, celante antaŭenigi akcepton de tiaj veturiloj, tion informis la firmaoj ĉi-marde, la 29 de novembro.

Instigitaj de la sukceso de Teslo, kiu ricevis grandajn antaŭmendojn pri ties aŭto Model-3, la germanaj konkurantoj Porŝo, Mercedes-Benzo kaj BMW, kaj la eŭropa sekcio de Fordo, fondis komunan entreprenon por starigi 400 ŝarĝostaciojn jam ekde 2017. Laŭ la komunikaĵo de la firmaoj ĝis 2020 ili planas oferti milojn da tiaj “punktoj” de pil-reŝargo.

Sigmar Gabriel, la germana ministro pri ekonomio kaj teknologio kaj potence konkuranto de Angela Merkel venontjare, volas ke Germanujo iĝu elstara lando je teknologio pri elektraj aŭtomobiloj.

Fonto: <https://esperanto.blog/2016/11/30/europo-rapida-resargo-de-elektraj-autoj/>

LA RIBELO DE VEGANOJ KONTRAŬ LA NOVA "FIVER"



Ekde pasintseptembre, kiam la nova 5-pundsterlinga monbileto aperis, ĝi ekhavis multe da ŝatantoj en

Unuiĝinta Reĝlando. Konata kiel “fiver” ĝi estas forta, malfacile disŝirebla kaj lik-imuna. Sed tiu monbileto ne estas tia: “sen graso”. Ĝi estas plasta, presita sur polimero, enhavanta etan kvanton da besta graso, kaj veganoj ĝeniĝas je tio.

“Mi ne plu akceptos tiajn monbiletojn. Ironie mi donacis mian unuan “fiver”-on al vegana sanktejo”, tion afiŝis Angela sur Tvitero.

Veganoj kaj vegetaranoj sentis sin ofenditaj je tiu revelacio, kaj esprimis indignadon pere de la sociaj retoj. Pli ol 40 mil homoj subskribis peticion, kiu petas ŝanĝon de la materialoj por la monbileto. Banko de Anglio konfirmis la uzon de animala graso por fabrikado de tiu monbileto. Laŭ komunikaĵo: “Ni konfirmas, ke la polimero-pasto el kiu la komponaĵo de la monbileto estas farita, enhavas postsignojn de substanco konata kiel sebo”.

Fonto: <https://esperanto.blog/2016/12/02/la-ribele-de-veganoj-kontrau-la-nova-fiver/>

FORPASIS LA INVENTINTO DE BIGMAKO



La eksa franĉiz-akceptanto de Makdonaldo nome Michael Jim Delligatti, 98-jaraĝa, kiu elpensis la Bigmakon, mortis ĉi-

merkrede, la 30-a de novembro. Antaŭ 50 jaroj, kiam Makdonaldo vendadis nur simplajn opciojn pri hamburgeroj, Delligatti decidis novigi farante version grandan por la produkto de la restoracia reto.

Laŭ la usona gazetaro, Makdonaldo kontraŭstaris la proponon de Delligatti, ĉar tiam la vendado de la ekzistantaj hamburgeroj estis sufiĉe bona, sed ĝi permesis al la entreprenisto vendi sian egan hamburgeron je ties 47 butikoj en la regiono de Pitsburgo (Usono).

Tuj post la sukcesa vendado de tiu sandviĉo, Makdonaldo inkluzivigis ĝin en sia menuo. En 1968 ĝi estis lanĉita en la tuta usona reto, kaj iom poste ĝi eniris la tutmondan menuon. Delligatti ne gajnis partoprenon je la koncerna vendado.

Nuntempe tiu produkto estas vendata tutmonde kaj eĉ iĝis “ekonomia indiko”. La revuo “La Ekonomiisto” kreis en 1986 la indicon Bigmakon, kiu komparas la prezon de la produkto ĉe pli ol 100 landoj.

Fonto: <https://esperanto.blog/2016/12/01/forpasis-la-inventinto-de-bigmako/>

Gramatiko - Pri la verba valento

Plena Ilustrita Vortaro (PIV - 2005) mencias en la antaŭparolo la terminon “verba valento”. Kio estas la verba valento? Bonŝance la propra vortaro donas difinon:

“nombro de ligoj, kiujn verbo povas havi kun siaj komplementoj (inkl subjekton); [ekz.] pluvos estas nulvalenta, donas estas trivalenta”

Hodiaŭ mi parolos iomete pli pri tiu afero.

En la Eo-Vikipedio ne troviĝas artikolo pri la verba valento. Sed en la artikolo kies kapvorto estas “Verbo”, la interreta enciklopedio bone – kvankam mallonge – informas pri la valento, aŭ “valenteco”. Mi citas:

La nombro de argumentoj, kiujn verbo bezonas, estas ĝia valenteco. Laŭ valenteco, oni povas klasifiki verbon kiel unu el:

- *Netransitiva (valenteco = 1): la verbo havas nur subjekton. Ekzemple: "li kuras", "ĝi falas".*
- *Transitiva (valenteco = 2): la verbo havas subjekton kaj rektan objekton. Ekzemple: "ŝi manĝas fiŝaĵon", "ni ĉasas kuniklojn".*
- *Doble transitiva (valenteco = 3): la verbo havas subjekton, rektan objekton kaj nerektan objekton. Ekzemple: "mi donis al ŝi libron", "ŝi sendis florojn al mi".*

Lingvoj eĉ povas havi verbojn kun valenteco = 0. Ekzemple, en Esperanto, oni povas diri ke akveroj falas el la ĉielo per unu verbo, sen subjekto kaj sen objekto: "Pluvos". Oni kelkfoje nomas ĉi tiujn verbojn "senpersonaj verboj".

Percepteblas, ke la valento, aŭ valenteco, estas pli ampleksa ol la koncepto de transitiveco, ampleksante ĝin. Ekzemple la valento inkluzivas la subjekton – kiu ne ludas rolon rilate al la transitiveco. La subjekto estas unu el la “argumentoj” (aŭ “komplementoj”). La fakto estas, ke la verbo – aŭ sia valento – determinas, kiom da argumentoj kaj kiaj estas necesaj por ke la frazo estu korekta.

De kie devenas la termino “valento”? – De la kemia scienco. Denove mi citas PIV-on:

“[En kemio valento estas] Nombro de unuoblaj ligoj, kiujn atomo povas havi kun najbaraj atomoj en molekulo”

Do kiel atomo bezonas aliajn atomojn por formi specifan molekulon, la verbo bezonas specifan nombron de argumentoj por ke estiĝu korekta frazo.

Estis la franca lingvisto Lucien Tesnière, kiu uzis la terminon “valento” en sia teorio de la dependeco, aŭ dependogramatiko
https://eo.wikipedia.org/wiki/Lucien_Tesni%C3%A8re
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Dependogramatikoj>

Bedaŭrinde ankoraŭ multaj gramatiklibroj kaj precipe vortaroj ignoras la gravecon de la valento, informante nur pri la transitiveco. Sed la transitiveco ne sufiĉas por konstrui korektajn frazojn.

Ekzemple:

Laŭ ordinaraj vortaroj “loĝi”, “penetri”, “pensi” kaj “pluvi” simple estas netransitivaj verboj. Tamen ilia valento montras, ke la konstruo de la frazoj malsamas:

- “loĝi” kutime bezonas subjekton kaj lokan adverbcon: Mi loĝas en Braziljo / ĉi tie.
- “penetri” bezonas subjekton kaj kutime lokan adverbcon kiu indiku movon (ĝenerale kun la prepozicio “en”): La veneno penetris en la sangon. La akvo penetris tien.
- “pensi” bezonas subjekton kaj – kutime – prepozitivan objekton (kun la prepozicio “pri”): Mi pensos pri tio.
- “pluvi” ne bezonas subjekton nek iun ajn (alian) komplementon: Kio okazas? – Pluvos.

Ofte la vortaroj montras en la donitaj ekzemploj (kiuj nepras !), kiel oni konstruu la frazojn, sed ofte tio estas nesufiĉa aŭ konfuza. Gravus informi, kiaj komplementoj kaj – se bezonatas prepozicioj – kiuj prepozicioj devas aŭ povas esti uzataj.

Pri la valento ekzistas multaj libroj kaj artikoloj, sed ne en Esperanto. Ĝi estas mallonge menciita en artikolo de Christer Kiselman, eks-prezidanto de la Akademio de Esperanto:
<http://www.cb.uu.se/~kiselman/transitiv.pdf>

Ĉi tie mi mem povis nur doni etan ideon pri tiu afero.

Ĉiukaze dezireblus, ke ekzistu specifaj (kaj ampleksaj) vortaroj de verboj. Sed eĉ en la etnaj lingvoj tiaj bonaj vortaroj de verboj ĝenerale mankas, kaj oni povas diri,

ke PIV jam estas malgraŭ ĉio kompare bona vortaro.

Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis Herbert A. Welker el Brazilo

Fonto:

<http://esperantaretradio.blogspot.com/2016/08/pri-la-verba-valento.html>

La retejo Ipernity fermiĝos en januaro

Libera Folio

La retejo Ipernity, kiun multaj esperantistoj ekuzis en 2007 pro ĝia esperantlingva fasado, fermiĝos fine de januaro 2017 pro ekonomiaj problemoj. Ĉiuj enhaveroj riskas malaperi, se ili ne estos transmetitaj aliloken antaŭ tio.



Ipernity estas multlingva retejo, kie eblas afiŝi kaj komenti interalie fotojn kaj blogaĵojn. Eblas ankaŭ krei grupojn de uzantoj por diskuti diversajn temojn.

Kiam Ipernity estis fondita antaŭ dek jaroj la reta pejzaĝo aspektis tute alia ol nun. La nun popularaj retservoj Facebook kaj Twitter iĝis alireblaj por la ĝenerala publiko en la sama jaro kiel Ipernity, 2006, kaj ankoraŭ ne klaris, kiaspecaj retejoj gajnos la favoron de la uzantaro.

En 2007 multaj uzantoj proteste forlasis la popularegan fotoservon Flickr, ĉar ĝia posedanto Yahoo donadis al la ĉinaj aŭtoritatoj personajn informojn pri kritikantoj de la reĝimo, kiuj havis retpoŝtan konton ĉe Yahoo. Inter la forlasintoj estis ankaŭ Paul Peeraerts, la kreinto kaj administranto de unu el la esperantlingvaj foto-grupoj ĉe Flickr.

- Mi ne volas, ke mia mono servu por enkarcerigi senkulpajn personojn, li klarigis tiam.

Li transiris al la franca servo Ipernity, kiu tiam estis nur dulingva - franca kaj angla. Poste li verkis pri ĝi artikolon por Monato, kaj baldaŭ iĝis la kunordiganto de volontula grupo, kiu laŭ propono de la gvidantoj de Ipernity tradukis la fasadon de la retejo al Esperanto.

La versio en Esperanto ekfunkciis en oktobro 2007, kaj tiel Esperanto estis inter la unuaj lingvoj de Ipernity. La servo allogis multajn esperantistajn uzantojn pro sia lingva politiko, sed ankaŭ pro tio, ke elektinte Esperanton kiel sian lingvon la uzantoj facile povis trovi fotojn kaj aliajn enhavojn afiŝitajn ĝuste de esperantistoj.

En 2008 Ipernity estis premiita en konkurso de Mashable.com kiel "la plej bona filmkunhaviga retejo", kaj dum la postaj jaroj ĝi ricevis investojn kiuj ebligis evoluigi la retejon. Tamen post kelkaj jaroj ekaperis problemoj.

Laŭ la komerca modelo de Ipernity eblas aliĝi al la retejo senpage kaj afiŝi limigitan kvanton da enhavo, sed por liberiĝi de la limigoj necesas pagi jaran abonpagon. Tamen montriĝis ke la retuzantoj unuavice elektas senpagajn servojn, kaj ne sufiĉe multaj pretas pagi. Tial jam en 2014 la firmao devis fari drastajn reduktajn.

En januaro 2016 la teamo de Ipernity avertis pri la risko, ke la servo povos esti fermita, se la ekonomia situacio ne pliboniĝos. La 1-an de decembro la teamo anoncis ke la strebadoj trovi partneron kiu pretus investi en la servon ne sukcesis, kaj ke la servo tial plej verŝajne estos malŝaltita en la fino de januaro 2017.

"Kiel vi povas imagi, tio tre malĝojigas nin, precipe ĉar ni scias, ke multaj el vi sentas tre proksiman ligan al Ipernity. Ni sentas nin tre senhelpaj pensante, ke ĉi tiu spaco, kiun ni ĉiuj helpis konstrui dum dek jaroj, baldaŭ malaperos. Kiel ni promesis, ni strebos helpi vin konservi ĉiujn viajn publikaĵojn", la teamo skribas en sia afiŝo.

Multaj esperantistoj havas centojn da fotoj, blogaĵoj kaj aliaj enhaveroj en Ipernity. Ankoraŭ ne klaras, en kia maniero oni povos facile elŝuti kaj konservi la enhavojn.

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2016/la-retejo-ipernity-fermigis-en-januaro>



La inspektoro haltis.

"Povas esti," li flustris, "ke Helmo Dalen venis ĉi tien, aŭ eble iu alia venis kun kontrabandaĵo. Ĉiuokaze estos danĝero. Vi, do, restu malantaŭ mi, dum mi provas la enirejon."

Tiam je la surprizo de Andreo li demetis la jakon kaj ĉapon, pendigis la

jakon sur bastono, kiun li kunportis, kaj metis la ĉapon super ĝin.

"Sendube estas neniu ĉi tie," li tiam kriis laŭte. "Mi eniros!"

Kaj li antaŭenmetis la bastonon tiel, ke la vestaĵoj montriĝis antaŭ la tunelo. Tuj oni aŭdis krakegon, kaj truo aperis en la jako. Iu pafis ĝin je distanco de ĉirkaŭ unu metro.

Sed preskaŭ en la sama momento venis alia pafo, kaj viro falis el la tunelo. Estis Helmo. Tuj poste Andreo kaj la policanoj aŭdis voĉojn kaj paŝojn en la tunelo. Ili atendis dum momento, kaj tiam du viroj aperis. Ili rigardis la falintan viron kaj tiam la policanojn kaj la knabon. Unu el la viroj estis policano el Montoverda, kaj la alia, je la granda surprizo de Andreo, estis...lia patro!

"Patro!" li ekkriis. "Kion vi faras ĉi tie?"

"Kion mi faras ĉi tie?" ripetis la patro kaj ridis. "Jen bela demando! Mi faras oficialajn aferojn. Sed mi povus demandi al vi, kion vi faras ĉi tie! Tamen, unue ni devas fari ion pri tiu," kaj li indikis Helmon.

La viroj rigardis tiun kaj vidis, ke li ankoraŭ vivas.

"Do, mi zorgos pri li," diris la inspektoro. "Ni reportos lin al Svenburg, kaj mi supozas, ke la knabo iros kun vi. Mi ĝojas, ke ni sukcesis trovi lin. Sendube ni komunikos kun vi poste pri la tunelo."

Li diris la vortojn al la policano, sed estis la patro de Andreo kiu respondis.

"Mi diros al vi nun, kion ni faros rilate al nia flanko. Ni

detruos ĝin per eksplodilo. Bonvole informu vian estron pri tio."

La inspektoro rigardis lin kun surprizo.

"Kaj vi, sinjoro, estas...?" li demandis.

"Kolonelo Trentano, estro de la dogana fako de nia lando," estis la respondo.

"Sinjoro Kolonelo," diris la inspektoro, "mi bedaŭras, ke mi ne sciis, kiu vi estas. Mi certe informos mian estron."

"Dankon," diris kolonelo Trentano. "Kaj mi dankas vin ankaŭ pro via servo al mia filo. Ŝajnas ke li jam decidis fari la saman laboron kiel la patro, ĉu ne?"

Kaj inter ridoj de ĉiuj, la viroj adiaŭis unu la alian; la Karenaj policanoj komencis forporti Helmon; kaj Andreo, lia patro kaj la policano el Montoverda eniris la tunelon. La knabo volis fari demandojn, sed lia patro malpermesis tion.

"Vi povos demandi pri ĉio kiam ni alvenos ĉe la policejo de Montoverda," li diris.

Baldaŭ la tri atingis la finon de la tunelo, kaj grimpis el la truo ĝis la tero. Kaj tie apud la enirejo staris Lizbeta.

"Jen la knabino," diris la kolonelo, "kiu diris al la polico pri la tunelo, kaj pri tio, kio okazis al vi."

"Patro," diris la knabino, "vi restis tre longe en la tunelo, kaj mi kredis, ke mi aŭdas pafojn."

"Estis pafoj," respondis la patro, "sed ne gravas. Ni estas tute sanaj."

Ili marŝis ĝis la vojo, kie polica aŭtomobilo atendis ilin. Ili eniris ĝin kaj forveturis, kaj baldaŭ atingis la policejon.

Kiam ili eniris, Andreo ne povis atendi plu.

"Patro," li diris. "Mi volas tiom demandi. Ĉu vi vere estas estro de la dogana fako? Kaj kial vi venis hodiaŭ al Montoverda, kaj kion...?"

"Atendu, atendu," ridis la patro. "Mi ne povas respondi al kvindek demandoj en la sama momento. Unue,

Lizbeta povas diri al vi, kion ŝi faris post via kaptio."

"Mi vidis, ke la viro kaptis vin," diris la knabino, "kaj kiam vi ambaŭ foriris, kaj la viro ne vidis min, mi revenis laŭ la tunelo. Mi tre timis, ĉar estis mallume kaj mi estis sola, sed finfine mi elvenis, kaj tiam mi devis marŝi al Montoverda kaj informi la policon."

"Tiam," daŭrigis ilia patro, "la inspektoro telefonis, unue al la polico de Svenburg, kaj due al mi por diri, ke oni eltrovis la tunelon. Li ne diris, kiu eltrovis ĝin, kaj estis granda surprizo al mi, kiam mi trovis, ke vi jam estas en Karenlando!"

"Estis granda surprizo al mi," diris la inspektoro, kiu ĵus envenis, "kiam mi eltrovis, ke ili estas viaj infanoj!"

"Mi povas imagi tion. Nu, kiam la Svenburga polico telefonis por diri, ke ili trovis vin, mi eliris kun Lizbeta kaj la policano por viziti la tunelon. Lizbeta gvidis nin al ĝi kaj atendis tie dum ni eniris. Dum ni marŝis laŭ la tunelo, ni subite aŭdis paŝojn, kaj tiu viro envenis. Li preskau koliziis kun ni, sed feliĉe li ne vidis nin, kaj haltis ĉe la enirejo.

"Ni atendis sufiĉe longan tempon, kaj tiam ni aŭdis aliajn paŝojn. Kelkajn minutojn poste ni aŭdis iun diri: 'Sendube estas neniu ĉi tie; mi eniros', kaj mi vidis la formon de policano. La viro tuj pafis, kaj mi pafis

ankaŭ lin. Tiam mi trovis, ke ne estis policano, sed nur lia jako! La reston vi jam scias."

"Sed kion pri onk..." komencis Andreo, sed lia patro donis al li avertan rigardon, kaj li ne diris pli.

Kolonelo Trentano faris kelkajn aranĝojn kun la polica inspektoro, kaj tiam eliris kun la du infanoj.

"Mi ne volis, ke vi menciu onklon Konrado," li diris, kiam ili estis sur la strato, "ĉar Lizbeta ne menciis lian nomon en la policejo. Ŝi diris nur, ke vi sekvis viron en la tunelon. Kaj pro tio, ke onklo Konrado ĉiam bone agis al vi, kaj ke vi estis gastoj en lia domo, mi ne volis, ke oni malliberigu lin. Kaj mi jam sendis letereton al li, por sciigi lin ke vi estas kun mi. Tio ne estis vera, ĉar je tiu tempo, junulo, vi estis en Karenlando!"


"Tio estas bona afero," respondis Andreo, "sed...se li estas kontrabandisto, ĉu vi rajtas fari tion? Ĉu la polic...?"

"Ni ne kaptis lin dum la ago," diris la patro. "Do, kiu rajtas diri, ke li estas kontrabandisto? La polico nun lasis la aferon en miaj manoj...kaj mi intencas paroli kun onklo Konrado, kiam ni atingos la domon."

(FINO)

Vortareto		jako	ceket	dogana	gŭmrŭk
		kolonelo	albay	fako	bŭlŭm, departman
inspektoro	mŭfettiŝ	estro	yŭnetici	kaptio	yakalanma
flustri	fisŭldamak	baldaŭ	yakinda, kisa	imagi	hayal etmek
kontrabandaĵo	kaĉakĉilik		sŭrede	kolizii	ĉarpŭŝmaks
demeti	ĉikartmak	atingi	varmak		
pendigi	asmak	adiaŭi	vedalaŝmak		
sendube	ŝŭphesiz	policejo	karakol		

ESPERANTO.NET Havos novajn aspekton kaj enhavon



Responde al la alvoko publikigita en Gazetara Komunikado alvenis kvar kandidatigoj ĝis la limdato. La Estraro havis tre malfacilan taskon elekti inter la kvalitaj kandidatigoj, kaj sekve de intensaj diskutoj kaj studoj la elekto falis sur la provrejtejon eonet.learnlangs.com. Ĝin kreis Judith Meyer kaj Adam Scott, kiuj nun intense laboros por krei la finan version de la

onta esperanto.net. **Esperanto.net** estas retejo por informi tiujn homojn, kiuj interesiĝas pri Esperanto, kaj gvidi ilin al la komunumo. Konsilioj, sugestoj estas tre bonvenaj al esperantonet@co.uea.org, aŭ en la baldaŭ oficiale lanĉota forumo ĉe forumo.esperanto.net. Ĉar laŭ la planoj la nova retejo esperanto.net estos same plurlingva, kiel la pasinta, sinancoj por tradukado de ĝi kaj por aliaj helpaj laboroj estas tre bonvenaj al esperantonet@co.uea.org. La tradukado verŝajne komenciĝos fine de novembro, komence de decembro

Emilio Cid

Mallonga Historio de Filozofio (12)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun René Descartes (Kartezio).

Vasil Kadifeli

Ĉu mi estas sonĝanta? René Descartes (Kartezio)



La alarmhorloĝo sonoras, vi vekigigas, vi ellitiĝas kaj komencas prepari vin por la taglaboro, sed ĵus tiam vi denove aŭdas la vekhorloĝon kaj vi komprenas ke ĉio estis sonĝo. Tiajn sonĝojn oni

nomas “falsa viglado”. Kartezio (1596-1650) ankaŭ spertis tian sonĝon kaj poste komencis pensi pri ĝi. Kiel homo povas esti certa, ke li ne sonĝas?

Filozofio estis nur unu el la intelektaj interesoj de Kartezio. Li estis sukcesa matematikisto kaj li estas fama pri sia “kartezia koordinatsistemo”. Li ŝatis sciencon, kaj li estis ambaŭ astronomo kaj biologisto. Li estas konata kaj fama ankaŭ pri siaj du libroj “Diskurso pri la metodo” kaj “Meditado” en kiuj li ekzamenas la limojn de scio.

Kiel multaj filozofoj li neniam kredis je aferoj kiujn li ne pridemandis. Plue li ŝatis demandi strangajn demandojn, kiujn aliaj homoj tute ne pensis, pri la afero. Li sciis ke li ne ĉion en la vivo povis pridemandi ĉar alie tiu ne estus vivo. Tamen por atingi la veran scion li pensis ke ĉiu penado valoris. Lia metodo pri tio estas konata kiel la “kartezia skeptikizmo”, kiu fakte estas tre simpla metodo: “Neniam akceptu ion, se en ĝi estas eĉ la plej malgranda probableco de malvero”. Se vi pensas ke vi estas veka legante ĉi tiujn liniojn vi devas testi tion por ke vi estu tutcerta. Li ĉiam provis scii se io aspektas ĝuste tiel kiel li ĝin vidas. Sed en la fino de tia skeptikizmo estis la danĝero pensi ke nenio estas vera kaj reala.



Li unue pensis pravi ĉion per la kvin sentoj de la korpo sed poste li konstatis, ke li ne povas fidi al la korpaj

sentoj ĉar ili povas esti misgvidaj. Ĉio povas esti iluzio. Vi nun legas ĉi tiun revueton sed ĉu vi estas veka aŭ vi sonĝas? Vi neniam povas esti certa, eĉ se vi pinĉas (sento) vin, ĉar oni povas pinĉi sin ankaŭ en sonĝo. Eble iu ĝino ludas kun vi kaj via menso kaj li faras vin pensi ke vi legas. Vi ne povas esti certa pri tio. Tiu afero kun la ĝino estis la plej ekstrema punkto de liaj pensoj.

Sed poste li pensis, ke “se li rezonas li devas esti io” alie eĉ la ĝino ne povus fari lin pensi, “li devus esti io ekzistanta”. Do jen lia fama diro en la latina: “**cogito ergo sum**” aŭ “*Mi rezonas, do mi ekzistas*”. Do oni ne povas dubi pri sia ekzistado. Kio li estas, kio li sentas, kiel li perceptas la mondon ktp estas tute alia afero. Vi povas dubi ke vi havas korpon aŭ ne, sed ne pri via ekzistado. Per tio li komprenis ke **Pirano** eraris (vidu numeron 5), oni ne povas dubi pri ĉio, ĉar almenaŭ oni mem ekzistas. Ni povas diri ke Kartezio estis pli certa pri via menso ol lia korpo. Se li pensus ke li ne havis menson kiel li povis pensi?

Li bezonis ankaŭ aliajn certecojn. Ekzemple li konstatis, ke Dio ekzistas kaj li estas bona. Pro tio li apogis version de la pensoj de **Sankta Anselmo** (vidu numeron 10) kaj tiel li pruvis al si la ekzistadon de Dio. Se ni havas penson pri Dio, tiam Dio ekzistas. Kaj se Dio ne estas bona, Dio ne estus perfekta. Plue bona Dio ne mensogus al homo pri tiaj bazaj aferoj, do li konstatis ke la mondo kaj vivo estas preskaŭ kiel li ĝin perceptas kaj spertas. Sed poste aliaj filozofoj diris ke la “ĝino” ege ludis kun li kaj faris lin kredi, ke Dio ekzistas kaj estas bona, ĉar li pruvis ĉion bazita je la boneco de Dio.

(daŭrigota)



EL UNUA PARTO - TAŬO

13



Favoro tiel hontigas kiel konsterno.
Honoro estas tiel granda malfeliĉo kiel esti persono.

Kion tio signifas: "Favoro estas hontiga kiel konsterno?"

Favoro estas humiliga.

Oni atingas ĝin kun konsterniĝo.

Oni perdas ĝin kun konsterniĝo.

Tio estas: "favoro estas tiel hontiga kiel konsterno."

Kion tio signifas: "Honoro estas tiel granda malfeliĉo kiel esti persono?"

La kaŭzo, kial mi suferas grandan malfeliĉon, estas, ke mi estas persono.

Se mi ne estus persono,
kiu malbono tiukaze povus trafi min?

Tial: Kiu honoras per sia persono la mondon,
al tiu oni povas konfidi la mondon.

Al tiu, kiu amas la mondon je si mem,
oni konfide povas transdoni ĝin.

Rimarko de Rikardo Vilhelmo

Tiu alineo estas tekste tre damaĝita. Post la dua linio videble parto de malnova komento eniĝis la tekston. Ni uzis ĝian klarigon por la traduko de la du unuaj linioj. La fina frazo ripetiĝas en duobla versio.

Ke oni ne dependu de favoroj kaj honoroj de aliaj, estas grava afero por la memo de homo, sed tio ne signifas, ke oni vivu sola kaj sen amikoj kaj sen helpo de amikoj. Ĝi signifas, ke oni misfidu al ĉiu, kiu volas dependigi nin per favoroj kaj honoroj, per donacoj kaj postenoj.

Rimarkoj de Cezar

La traduko de Wang Chongfang tiom grave deflankiĝas de la traduko de Rikardo Vilhelmo, ke mi prefere tute redonas ĝin ĉi tie por komparo:

"Favoro kaj malfavoro kaŭzas konsternon.

Granda malfeliĉo estas same grava, kiel nia korpo.

Kion do signifas, ke favoro kaj malfavoro kaŭzas konsternon?

La favoro estas humiliga per si mem;

Ĝin ricevante kaj perdante

Oni same konsterniĝas, –

Jen kion signifas, ke favoro kaj malfavoro kaŭzas konsternon.

Kion do signifas, ke granda malfeliĉo estas same grava, kiel nia korpo?

La kaŭzo, kial granda malfeliĉo nin trafas,

Kuŝas en tio, ke ni havas la korpon.

Se ni ne havus la korpon,

Kia malfeliĉo povus fali sur nin?

Tial nur al tiu, kiu zorgas pri la aliaj, same kiel pri si mem,

La mondo povas esti konfidita;

Kaj nur tiu, kiu amas la aliajn, same kiel sin mem,

Estas inda je la regado super ĝi."

(daŭrigota)

Batalo sur vinberoj

Iam maljuna viro donacis malgrandan sumon de mono al perso, arabo, turko, kaj greko, kiujn li vidis ie parolantaj grupe kaj trankvile, dirante "aĉetu kion ajn vi volas per tiu mono kaj plezurigu vin". Ili dankis lin kaj poste la perso diris "ni aĉetu angur-on" (*). Sed la arabo ne konsentis kaj li diris "ne estu stulta, mi tute ne volas angur-on, ni aĉetu inab-on" (*). Tiam la turko kontraŭstaris al tiu ideo kaj diris "mi ne volas angur-on nek inab-on, ni aĉetu uzum-on" (*). Sed al tio la greko tute ne konsentis kaj diris "haltigu la malsaĝaĵojn, mi volas stafili-on (*), ni aĉetu stafili-on per tiu mono". Kaj tiam ili komencis disputi kaj kvereli pri kion ili aĉetu per la mono kaj estis granda batalo inter ili. Ĝus tiam, kiam pugnoj ekaperis, klerulo estis preterpasanta. Li haltigis



ilin kaj demandis pri kio ili estis interbatalantaj. Ĉiu rakontis sian vidpunkton al la klerulo kiu komprenis ke ili estis parolantaj per malsimilaj lingvoj kaj diris "trankviliĝu, mi komprenis kion vi volas, mi aĉetos ĝin por vi kaj ĉiu estos kontenta pri tio, kredu min". Tiam li prenis la monon kaj aĉetis vinberojn, kiujn donante al ili, li diris esperante "Tiu nomigis vinberoj manĝu ilin!" Do ĉiuj estis kontentaj kaj la senseca disputo estis forigita danke al monda kaj komuna lingvo Esperanto.

Parabolo el la verko Masnavio de Rum'i

(*) ĉiuj vortoj signifas vinberoj en la respektivaj lingvoj.

Sendis nia persa amiko Alĉjo en angla kiun mi pliparaboligis :-)

Vasil Kadifeli

Kiel granda plezuro estas stiri aŭtomobilon en tiu belega, somera mateno. La suno brilas, sed ankoraŭ ne estas varmege, kvankam kelkfoje oni povas vidi fatamorganon de la vojo fore.

La ĉielo admirinde bluas, kelkajn ŝafidformajn nubojn ordonadas nevidebla ŝafisto. Kvazaŭ tio estus granda ŝafpaŝtejo. Multfoje rigardadas mi la ĉielon ĉiam varieblan. Mi imagvidas tie diversajn formojn de nuboj.

Mi fartas bone, tre bone.

Baldaŭ mi atingos la aŭstran limtrapasejon, mi esperas, mi ne devos atendi multe. Depost kiam ankaŭ ni, hungaroj, fariĝis eŭropuniaj civitanoj, povas vojaĝadi pli facile ene de Unio.

Malaperis la landlimoj, nur la lingvaj limoj restadis. Mi ne regas la germanan, ankaŭ aliajn naciajn lingvojn mi ne scipovas. Bonŝance, ke dum Esperanto-renkontiĝo ne gravas de kie vi venis, kiun lingvon vi parolas. Ĝis mi atingos la celon, mi uzos la internaciajn mansignojn por komprenigi min. Mi eĉ ne povas imagi, ke mi renkontos ulon esperanto parolantan dum la vojaĝo

Jen, ĉi tie estas informtabulo, kiu anoncas, ke baldaŭ mi atingos finon de la aŭtostrado, sekvos aŭtovojo kaj poste ĉefvojo. Mi ŝatintus, se iu el nia klubo estus veturinta kun mi, mi ŝategas konversacii. Tiel ĉi nur mi povas dialogi kun mi mem, hm... mi estas bona kunparolanto, he-he-he.

Nu, fine mi atingas la limstacion. Ŝajne, ĉiu kaj ĉio estas trankvila, neniuj hastas nerveze, tio estas bona signo. Alta, sunbrunigita limgardisto proksimiĝas al mi.

-- Bonan Tagon! Bonvolu montri al mi vian personan atestilon.

-- Jen ĝi!

-- Kien vi veturas?

-- Mi veturas al Esperanto-Aranĝo en Vieno.

-- Ho! Mi jam aŭdis pri ĝi. Ĝi estas iaspeca artefarita lingvo, ĉu?

-- Jes, tiaspeca.

-- Bonan Vojaĝon! -- kaj li redonas mian atestilon.

Mi startigas mian aŭton malrapide, mi ne hastas, nun mi jam havas iom da tempo. Mi rigardadas la apudvojan pejzaĝon, kiel bela kaj pura estas ĉio tie ĉi! La aŭtotrafiko sufiĉe densas, kelkuloj veturadas ege rapide, ĉiuj rapidas al ie. La ŝoforoj preterveturas unu la alian danĝere, kiel ekzemple tiu kontraŭe. Oj, tio estos tre danĝera, ve-ve, tio certe ne sukcesos...

Kio okazis? Kie mi estas? Ĉio estas malkonata por mi. Mi kuŝas en fremda lito, vestita en fremda piĝamo. Estas duonlumo, aŭ mi vidas malbone? Mia cerbo komencas vekigi, eĉ miaj sensoj akriĝas. Hm, mi

sentas hospitalodoron. Kial mi estas ĉi tie? Mi memoras pri nenio. Mi aŭdas voĉojn de ekstere, mi komprenas nenion el la parolado. Ŝajnas al mi, ke oni parolas germane, sed mi ne certas. Malfermiĝas la pordo kaj enpaŝas flegistino.

-- Kiel vi fartas? - demandas ŝi.

-- Mi fartas sufiĉe bone - mi respondas aŭtomate.

-- Kie mi estas? - mi interesiĝas malcerte.

-- Vi estas en hospitalo, en Vieno - diras ŝi iom ridete.

-- Kiam mi enhospitaliĝis? - mi daŭrigas vicon de la demandoj, kaj subite bombas la rekono en mia cerbo, kiun lingvon ni uzas. Ja mi konversacias Esperante en viena hospitalo.

-- Ho, jam tre antaŭ longe. Vi estas ĉi tie 15 jarojn. Vi kuŝis en komato ĝis nun.

-- Kiu dato estas nun?

-- Hodiaŭ estas la 12-a de majo, 2027.

-- Vi bone parolas Esperante - mi konstatas nur flanke.

-- Kio okazis al mi?

-- Vi havis teruran aŭtoakcidenton, kaj oni portis vin ĉi tien.

-- Kiel bona afero estas, ke vi parolas la lingvon internacian. Ni ne povus komuniki alimaniere, ĉar mi ne scipovas paroli germane - mi diras kontente.

-- Ho, kompreneble, ĉi tie ĉiuj parolas Esperanton. Ho, mi nun ekmemoras, ke vi ankoraŭ ne povas scii pri la granda lingva ŝanĝiĝo, kiu okazis jam antaŭlonge.

-- Hm...? Kiun ŝanĝiĝon mi ne povas scii? - mi demandas nekomprene.

-- Antaŭ 13 jaroj Eŭropa Komisiono decidis, ke en ĉiuj membroŝtatoj oni devas enkonduki la instruadon de lingvo Esperanto en la bazaj lernejoj. Poste Esperanto fariĝis pontolingvo inter la nacioj. Nun jam ĉiuj en Eŭropo parolas sian nacian lingvon kaj Esperanton - ŝi klarigas entuziasme.

-- Ho, mia Dio, do tamen sukcesis! Ja ni luktis ĝuste por tio dum jardekoj, apenaŭ mi povas kredi tion. Do, tamen esperantistoj sukcesis konvinki la registarojn, ke ne ekzistas alia solvo por atingi la lingvan egalecon. Mia flegistino rimarkis mian subitan entuziasmon, kaj tiel alparolis min:

-- Mi pensis, ke vi estos ĝojanta pro tio. Mi scias, ke vi estas esperantisto, mi vidis vian verdan insignon sur via jako. Mi nun devas iri por raporti pri via "reviviĝo" - kaj ŝi forlasas la ĉambron.

Mi restas sola kun miaj kirliĝantaj pensoj. Mi provas movi miajn piedojn, sed ne sukcesas. Mi provas movi miajn manojn, eĉ tio ne sukcesas. Ŝajne, mi bezonas iom da tempo por regeneriĝi. Subite mi sentas fortan



Kuiru kun mi

LASANJOJ KUN FUNGOJ KAJ JUGLANDOJ

INGREDIENCOJ

500 gramoj da lasanjoj
200 gramoj da fungoj
150 gramoj da juglandoj
1 fumaĵita mocarelo
olivoleo
parmezano
1/2 litro da lakto
50 gramoj da butero
50 gramoj da faruno
salo
nigra pipro
muskato

Ni lavu kaj ni tranĉu la fungojn en pecoj, tiam ni metu ilin en pato kun iom de olivoleo. Samtempe, ni elguŝigu la juglandojn kaj ni tranĉu la fumaĵitan mocarelon en pecoj. Ni preparu la beŝamelon. Vi devas kunigi la farunon al la fandita butero kaj miksi daŭre. Kiam la kunmetaĵo estos malhela, ni kunigu iom post iom la lakton, lasu la beŝamelon laŭ fajro malalta ĝis kiam ĝi estos densa. Ni metu la salon, la nigran pipron kaj la muskaton depende de via gusto.

Unufoje ĉiu ingredienco estas preparita, ni metu en la rostopato iom de beŝamelo por kuiri pli bone niajn lasanjojn kaj ni komencu meti la unuan tavolon de lasanjoj kun iom de fungoj kaj juglandoj, beŝamelo,



mocarelo fumaĵita en pecoj kaj raspita parmezano. Ni ripetu la operacion plurfoje, por pluraj tavoloj. Ni surŝutu la supran tavolon kun beŝamelo, mocarelo kaj parmezano. Ni ripetu la saman procezon pluraj fojoj ĝis alveni al la grandeco de la lasanjoj de via gusto.

Ni baku ĝin en la forno al 200°C por ĉirkaŭ 20 minutoj, ĝis kiam estos formiĝinta krusto.

Bonan apetiton!

Fonto:
<https://kuirukunmi.com/2015/05/26/lazanjo-kun-fungojn-kaj-juglandoj/>



Vortareto		pato	tava	rostopato	piŝirme kabı,
		elguŝigi	zarını ayıklamak		tavası
juglando	ceviz	fumaĵita	tütsülenmiş, isli	tavolo	katman
mocarelo	İtalyan peyniri,	beŝamelo	beŝamel sosu	raspita	rendelenmiş
	mozarella	kunigi	bir araya getirmek	surŝuti	üzerine atmak
parmezano	İtalyan peyniri,	fandita	erimiş	procezo	prosedür, süreç
	parmezan	kunmetaĵo	bir araya gelmiş		
faruno	un		tüm		
muskato	hint cevizi	densa	yoğun		

pisemon. Mi devus signi iel al la flegistino. Mi rigardas maldekstren kaj mi rimarkas la butonon de sonorilo. Mi devas atingi tiun aĉan vokilon. Ordonante al mia cerbo mi malrapide levas mian maldekstran brakon kaj premas la butonon. Kio okazas? Ja la sonorilo sonas apud mi. Mi eksaltegas el la lito, preskaŭ mi surfalas la plankon pro la subita kapturniĝo. Dio mia, mi nur sonĝis ĉion? Mi ĉirkaŭrigardas, ho jes, mi estas hejme, kaj la vekhorloĝo nur diras sian kantaĉon daŭre.

Mi residiĝas sur la randon de mia lito, trete-trote mi mutigas la vekhorloĝon. Ankoraŭ lumineskas la sonĝbildoj en mia cerbo, sed nur jam pale. Kiel interesa estis tiu ĉi sonĝo!

Domaĝe, ke ankoraŭ nun ni nur sonĝas pri tiu mondo!

Verkis: Ferenc Harnyos el Hungario

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/32630/426165>



Esperanto Kursu (13)



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

JOHANO KAJ LA FRUKTO

Ge-sinjoroj (1) Muso, kun la tri infanoj, loĝis en Angl-uj-o.

En la ĝardeno de Ge-sinjoroj Muso estas tri fruktarboj: pom-arbo, pir-arbo, kaj prun-arbo.

Ne estas banan-arbo, nek oranĝ-arbo, ĉar oranĝoj kaj bananoj ne kreskas en Angl-uj-o: estas tro malvarme.

La infanoj ne rajtas de-preni la frukton de la arboj; sed ili rajtas manĝi la frukton kiu falis al la tero.

Sed Johano estas malbona museto.

Li grimpas la pom-arbon.

Tiam li de-prenas pomon.

Tiam li metas ĝin sur malgrandan branĉon.

Tiam li saltas al la tero.

La vento blovas, kaj baldaŭ la pomo falas al la tero.

"Ho, ho," diras Johano "Tiu pomo falis. Mi rajtas ĝin manĝi."

Tiam li manĝas la pomon!

Tiam li grimpas la pir-arbon; li metas piron sur malgrandan branĉon, kaj, kiam ĝi falas, li manĝas ĝin ankaŭ.


Tiam li grimpas la prun-arbon; li metas prunon sur malgrandan branĉon, kaj, kiam ĝi falas, li manĝas ankaŭ la prunon!!

Vere Johano ne estas bona museto. Sed ĉiu muso tro multe manĝas.

(1) Ge-sinjoroj = Sinjoro kaj Sinjorino.

Sözlük

banan-arbo	muz-ağacı	loĝis	yaşadılar, ikamet ettiler (fiilin mastar formu: loĝi, ikamet etmek)
blovas	esiyor, üflüyor(fiilin mastar formu:blovi, esmek, üfleme)	oranĝ-arbo	portakal ağacı
branĉo	dal	pir-arbo	armut ağacı
de-preni	bir şeyden bir şey almak, kopartmak	pom-arbo	elma ağacı
frukt-arbo	meyva ağacı	prun-arbo	erik ağacı
frukto	meyva	rajtas	hakkı var (fiilin mastar formu: rajti, hakkı olmak)
ge-sinjoroj	bay ve bayan	vento	rüzgar
grimpas	tırmanıyor (fiilin mastar formu:grimpi, tırmanmak)		



Ekler:

- ge Her iki cinsi birden belirtir, erkek cins üzerinden kurulur ve her zaman çoğuldur. örnek: ge-patroj=anne+baba, ebeveynler, ge-sinjoroj=beyer bayanlar, bo-ge-patroj=kayınpederler
- uj ülke isimlerinin oluşturulması için kullanılır. Angl-ujo (İngiltere) Turk-ujo (Türkiye) (ujo=kap, içinde bir şey barındıran şey anlamındadır)
- de- Bu örnek fiile "bir şeyden" yapmak anlamını katar (ör. preni/depreni=almak/bir şeyden almak, kopartmak)

Kapanış



Yeni yılın ilk sayısında sizlere birbirinden farklı ve ilginç makaleler sunduk.

Açılış yazısında da bahsettiğimiz gibi Osmo Buller'in Esperanto dünyasına nasıl adım attığını anlatan hikayesini umarım okumuşsunuzdur.

Fantastik hikaye "koma" kısa ve nispete kolay okunabilecek bir hikaye idi.

Dilbilgisi kısmındaki "fiilerin değerlilikleri" hakkında makale de Esperanto öğrenmekte olanlara Esperanto fiil yapısına farklı bir bakış açısı sunmakta.

Gene Japo Esperantist Hori Jasuo'nun Tokyo Olimpiyatları ve nükleer reaktör problemleri hakkındaki yazı da ilginç idi.

Bu sayımızda sürekli roman "La Junaj Detektivoj"un sonuna geldik, önümüzdeki ay sizler için farklı bir seri başlatacağız.

Giriş yazısında da yazdığımız üzere 15 Aralık günü Esperanto dilinin yaratıcısı LL Zamenhof'un doğum günüdür ve bu gün Esperanto dünyasında "Zamenhof Günü" olarak kutlanmaktadır. Ancak ünlü esperantist Julio Baghy'nin önerisi ile bu gün Esperanto kültürüne ve edebiyatına katkı olması ve ayrıca dili öğrenenlerin Esperanto kültür seviyelerinin geliştirilmesi için bu gün aynı zamanda "Esperanto Kitap Günü" olarak

kutlanmaktadır.

Bizler de 17 Aralık Cumartesi günü küçük bir grup bir araya geldik ve kahve içerek sohbet ettik, bu özel günü kendi aramızda kutlamış olduk.

Sizlere bu özel günden iki fotoğraf sunuyoruz.



Solvo de la kruĉvort-enigma

	O	N	O	M		T	S	O		O	12
O	M	R	R		O	R	A	T	O	N	11
	I	G	I	K	U	D	E		M	I	10
O	N	A	A	R	K	U		O	E	L	9
	A	R	A	K	A	R	A	J	A		8
O		O			O	T	O	E	N	P	7
T			P	A	S		O	R	T		6
P	A	T	R		I	U	B	R	I	T	5
U	R		O	I	G	R	E	N	E		4
R	P		T	E		O	E	N	O	C	3
O	U	L	O	V	E			A	R	A	2
K	A	S	N		I	D	Ü	A	L	P	1
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12

*Herkese mutlu bir yeni yıl dileriz...
Sonraki sayıda buluşmak üzere...*

*Feliĉan Novjaron...
Ĝis revido en la februara numero...*

